


MARDA
PRISMO



4
1962

T. Gyenes: Albert Schweitzer.

pro ĉiuj rapide skribitaj leteroj, abonoj, donacabonoj kaj altvaloraj, diversformaj subtenoj de privatuloj kaj eldonejoj. En nia jara fina numero aperos listo pri la donacoj en 1962.

La nuna n-ro enhavas 95 % originalan literaturon. Kun plezuro ni mencias la kvar aŭtorojn de la originalaj rakontoj: Kilianĉuk (scienc-fikcio, nia felietono), L. M. N. Newell, kiu revenis ĉifoje kun majstra novelo, W. Nielsen, kiun reprezentas priprensiga legendo kaj fine, sed ne laste S. Szathmári, al kies laŭ nia spaco tro longa satiro ni donis lokon kun tiu riverenco, kiu decas al eleganta gasto. Ni esperas, ke ankaŭ la ceteraj kontribuantoj interesos niajn legantojn.

La Redakcio

NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura
revuo, dumonata*

Cefredaktoro:

Ferenc Szilágyi, Döbelnsgatan 66,
BORÁS. (Tel. 244 22.)

Redakcio:

Baldur Ragnarsson, (Reykjavik),
Johan Hammond Rosbach
(Sarpsborg),
Vilho Setälä (Trislahti),
Poul Thorsen (Kopenhago).

Ansvareg utgivare:

Yngve Nilsson.

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stockholm

Abonprezo:

12:— sv. kr. (30 intr. rkp., 2 1/2 us dol. aŭ egalvaloro.) Unuopa n-ro 2:75 sv. kr. (7 int. rk.) Abonu ĉe la administrejo per poŝtĉeka konto 15 54 80 aŭ ĉe la landaj esperanto-eldonejoj-libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 80:— sv. kr., 1/2 p. 50:—, 1/4 p. 25:—, 1/8 p. 15:—, 1/6 p. 12:— Korespondaj anoncoj 4:— sv. kr. (10 int. rkp.)

La redaktejo ne resendas ne akceptitajn manuskriptojn.

Alvoko	97
La portreto de Rousseau	98
O. Vinje (H. Fridén). Ĉe la rondoj	99
W. Nielsen: Trans la altaj montoj	100
L. Jevsejeva: Telegramo	102
Edmond Privat (1889—1962)	103
W. Wiecko: Printempo	103
E. Chopin (A. Su): Lasta poemeto	103
S. N.: Homo en la spegulo	104
Emba: Somero	107
L. N. M. Newell: Anna	108
H. Wergeland (Fridén): El la angla piloto	111
L. Tárkony: Transtera sopiro	111
S. Szathmári: La fluidumo	112
J. Nagy: Avoj sur benko	121
J. Korinek: Demandas malsanulo	122
A. S. J. Tessimond (Auld): La gazetaro	122
V. I. Kilianciuk (Kiŝinev): La Globo ..	124
Recenzoj: Specimene, La Profeto, Pro- verbaro, Bevingade ord, Sennacieca Novujo, Pejzaĝoj de Ĉinio	126
Novajoj P. 122, 128 k. kovrilpaĝoj Ilustraĵoj: (Gyenes) Kovrilpaĝo k. 104—107	
J. Asmar: Birgitte Neergaard	123

Korekto

En nia 3/1962a n-ro en la artikolon pri la bretona literaturo, dum ne facila reskribo kaj mallongigo enligitis kelkaj malĝustaĵoj. Bv. do ĝustigi la ortografion ĉe la nomoj Le Gonidec, Brizeux, Caloc'h, Jaffrenou-Taldir, Tanguy Malemanche. — La naskiĝdato de la aŭtoro estas 1898. — Fr. Luzel eldonis la poemaron "Befred Breizad" (ĉiam bretono), kiu — tiufoje — enhavas liajn proprajn poemojn, t.e. ne kolektitajn popolajn kantojn. Gravan eraron kaŭzis ellaso de frazparto: La franca revolucio en 1789 tute identigis administracie Bretonlandon kun Francujo. Kaj de tiam Bretonlando ne havas memstaran gubernian karakteron.

Ni petas pardonon de la aŭtoro kaj tiun de la legantoj.

ALVOKO AL LA AMIKARO

Kara Leganto!

"Se la trunko ĉesos vivi, ĉiuj esperoj estos perditaj. La esp-istaro devas zorgi..."

Tiel skribas Zamenhof ĉ. 1891, kiam la afero koncernis la ekzistadon de la unua kaj sola gazeto, "La Esperantisto", kiun li mem redaktis kaj administris.

Nuntempe la E-movado jam enradikiĝis ĝis tia grado, ke ĝia kontinua evoluo ne estas dependa de unu gazeto. Ni havas diverskarakterajn asociojn kaj estas memkompreneble, ke por ĉiu asocio la propra gazeto estas nepre bezono.

La tasko de Norda Prismo estas ĝuste unu el la gravaj, se ni traktas la E-movadon kiel tutan. Norda Prismo disponigas siajn paĝojn en la servo de tute universala kulturo, progreso socia, literaturo humanisma sur alta lingva nivelo.

Ĉiu esp-isto scias, ke la agado por E neniam estas facila. Altgrade malfacila estas la ekonomia parto de alt-nivelaj E-revuoj. Pli ol unu tia devis ĉesi, spite la oferemon de sia redakta-administra kolektivo.

Norda Prismo tamen apartenas al tiuj revuoj, kies eldonkolektivo sukcesis ĝin aperigi dum ok jaroj konstante. Dum 8 jaroj ne mankis problemoj: administraj, ekonomiaj, kiuj de tempo al tempo donis al ni dubon pri ĝia daŭra ekzisto. Multaj faktoroj kontribuis. Unue: komence ni fiksas la abonprezon tro malalta kaj sekve dum tiuj jaroj ekestis la fundamento de niaj ŝuldoj. Due: frostiĝis mono en nepagipovaj landoj. Trie: ni havis malfacilon pro la nereguleco koncerne la presadon de la revuo. Pli altaj preskaj afrankokostoj ktp, jen pluaj fak-

toroj, kaj hodiaŭ la afrankoaltiĝo estas denove fakto.

Feliĉe ni povas konstati, ke ni parte sukcesis. Ni povas montri al tiu respekto kaj laŭdo, kiun NP ricevis dum la jaroj, al ĝia disvastiĝo ĉirkaŭ la mondo. Ni havas multajn atestojn kaj pruvojn pri ĝia aparta pozicio en la E-gazetaro, varmajn simpatiojn kaj sinceron amikaron.

Hodiaŭ nia ekonomia pozicio estas tia, ke ni devas nin turni al la veraj amikoj de Norda Prismo por peti de ili garantian abonon *jam nun en ĉi tiu jaro por 1963*. La ekonomiaj premisoj por venontjara eldono ne estas tiaj, ke la administrejo ankoraŭ unu jaron povu subvencii perdon monan, kian ni havis ekde 1955. Pro tio ni volas havi klaran superrigardon de eventualaj abonantoj 1963 kaj vi kiu volas por 1963 ankoraŭ la revuon, devas sendi al la administrejo — atentu! nur al la administrejo — vian garantian abonon. *Kun tiu garantia abono ne estas necese sendi monon!* Tiu garantia abono devas esti ĉe la administrejo *plej malfrue la 25-an de novembro, 1962*.

Nia celo estas atingi 1500 abonantojn. Ĉu ni sukcesas, tio dependas de vi. Plenigu la aldonitan respondfolion kaj varbu inter viaj gekonatoj, esperantistoj! Helpu havigi abonkotizojn por esp-istoj en nepagipovaj landoj, kiuj vere sopiras nian revuon!

Jam ĝisnun multaj amikoj donis ekzemplojn de belaj agoj por N. Pr., kaj kompreneble ni varme dankas ĉiujn, kiuj super la modesta abonkotizo povas kaj volas oferi por tiu alta tasko, kiun nia organo reprezentas. Nia ambicio tamen estas kaj devas esti, havi sufiĉe da abonantoj, por ke

TRA NIA PRISMO

LA PORTETO DE JEAN-JACQUES ROUSSEAU

El "Informations Unesco" No 401, laŭ artikolo de Henri Guillemin — iom pli mallongigita.

Kial post pli ol du jarcentoj, Rousseau estas ankoraŭ vivanta inter ni?

Parton de lia verkaro oni ne plu legas, se ne temas pri specialistoj. Liaj "Diskutoj pri scienco kaj artoj", lia traktato pri la "Origino de Malegaleco", aŭ la "Leteroj el Montagne", "Emile" estas tiuj monumentoj, kiujn la sablo jam kovris. Sed la granda, tute varma, tute flagranta verko, de Jean-Jacques estas la "Konfeso" kun la kompletigaj "Revoj". Homo parolas per ili antaŭ ni, rakontante, kiu diris ĉion, eĉ siajn plej malicajn sekretojn.

Kiu estas do ĉi Jean-Jacques, kies voĉo atingas nian koron?

Li estis malriĉa ĝenevano, sed per sia familia origino "civitano de Genevo", t. e. ano de tiu pigmea minoritato, kiu tiutempe havis voĉon kaj decidrajton en la urba vivo.

Tiam 16-jara lernanto ĉe gravuristo Rousseau ekiras mondon kaj forlasis Genevon. Antaŭ tiu tempo li edukigis laŭ la reformita kristaneco. Dum sia vagado li ricevis novajn impulsojn ankaŭ kontrastajn (i. a. de madame Warens), sed abato Jean-Claude Gaimme vekis en li la plej restemajn, tiel,

Norda Prismo ekzistu surbaze nur de la abonkotizoj.

Bonvolu do tuj kaj nepre resendi la aldonitan kaj plenigitan blankedon. Estu certa pri niaj klopodoj pruvini dankemon per bona gazeto.

La administrantoj

Malte Gahlin Karl Ullström

ke li transiris al la katolicismo. La flama fervoro de la infano reaperas. Ĉu katoliko, protestanto? Esence li estas kristano, kaj la preĝoj, kiujn li komponis en sia 20-jara aĝo, estas plenaj de senpereco kaj sindono. Ĉiuj ĉi transformigoj, ŝanĝoj ne okazis sen suferoj. Tiu ĉi granda, ne erudicia knabo (liaj studoj ekhatis ĉe lia 13-a jaro) subite malkovris en biblioteko la universon de la scio. Li ekflamiĝas — 30-jara li estis tiam — en Parizo (1742) kaj la demono de la ambicio flustras al liaj oreloj. Li volas atingi le celon por ĉiu prezo; li interamikigas kun Diderot, kiu varbas lin al la *Enciklopedio*.

Sekvas tamen malhelaj jaroj, dum kiuj li tretadas sampaŝe. Li mokas sin, la iaman kredulon. Li volus iĝi ĉiupreze mondano, sed la mondon de la sopirataj luksoj kaj voluptoj li kondamnas. Lin stampis la infanmedio. Protesto incitas lin, kiun li volas subpremi. Nevenkebla elreliĝo. La infanojn, kiujn li helpis veni al tiu ĉi mondo kun sia amatino, simpla kampulino Thérèse Levasseur, li lasis fali en la kloakan vivon de la plej suba Parizo. Li ne havis la kuraĝon amaran, kiun li bezonis por voli.

Sed subite, en 1749, dum oktobra tago okazas radika ŝanĝo en lia vivo. Skuego renversas ĝin. Li rigardas en sin kaj ektimas. Li decidas jesi al sia infaneco. Jen reiro inter larmoj al la iamo, reen al la malsupro, al la lando de la puraj koroj, kiujn li jam forlasis. Kaj li ekverkas pri grandaj temoj:

eduko, politiko, amo, religio — en la nova lumo de certeco.

La turniĝo ne estis facila. Li havis dum iom da tempo rilaton al homoj, kiuj atendis lian kontribuon. La *En ciklopedio* sub la aspekto de simpla "racia vortaro de la sciencoj kaj artoj" estas fakte ilo de la milito, instrumento, kiu devas servi al la detruo, al la solviĝo, al la ekstermo de la kristanismo. La pinta plumo de Voltaire laboras rapide kaj efike, kaj rikoltas sukcesojn en la alta socio. La returno ĝenerala de Rousseau al la moralo kristana kun la baza morala leĝo de la amo, kaŭzas al li 24-jaran konstantan fuĝon antaŭ fanatika malamo de liaj eksamikoj. Li iĝas solulo, ĉies celtabulo.

Lia tuta pensado politika kaj morala estas komandita per lia percepto pri la homo kaj mondo. Tio estas lia fama teorio pri la "boneco natura". Kiam li diras *natura*, li indikas la "sentimenton internan", tiun ĉi preferon de la bono, tiun ĉi intuician konon de la "ĉefaj principoj", pri kiuj Pascal parolas. Kiel politikisto, ekonomia filozofo Rousseau estas kolektivisto, la tero apartenas al la kolektivo kaj perforto ne estas legitimebla. Li volis konturigi la kondiĉojn de tiu kulturo, kiu donas al la homo internan kaj eksteran harmonion.

En 1778 mortis la solulo, kiu kreskis je unu el plej universalaj pensuloj de la homa kulturhistorio. Kvin jarojn post la eksplodo de la granda revolucio oni transportis lian korpon al la Panteono apud lian grandan amikon kaj poste malamikon, Voltaire.

Kion li volis fine per siaj "Konfesojoj"? Ies krio ĝi estas — kiel li skribis en letero de 19/3 1767 —: "*Tiu homo, pri kiu vi kredas ke li estas mi, ne estas mi*". Ĉu vi diros, ke mi estas monstro? Egale, jen mia vivo, tiel kiel estis, kun sia tuta mizero, kun sia

O. Vinje (1818—1870)

"ĈE LA RONDOJ"

Muziko Edv. Grieg

*Nun tiajn montojn ree mi rigardas,
kaj valojn, kiel en la junulec';
la sama vent' al varma frunt'
malardas,*

*kaj same kuŝas oro sur la neĝ'.
Ĝi kvazaŭ infan-lingvo min
malhardas,*

*plenigas min per ĝojo kaj tristec'.
Junag-memoroj volas ŝtel-eniri,
alfluas min, ke mi ne povas spiri.
La viv' alfluas, same kiel ĝi faris,
dum sub la neĝ' aperis la herber'.*

*Mi staras kiel ĉiam mi ja staris,
vidante tiajn montojn en l' aer'.
Forpasas vivtumult', post kiam klaris,
kaj hela sun' trarilis en vesper'.*

*Mi certe trovos lokon por noktumi,
se nokta sun' min hejmen volas lumi.
Nenio ŝanĝis sin, sed iĝis klara,
pli hela al mi ŝajnas taga lum',
kaj kio iam faris min amara,
ĝi faras eĉ la nigran ombron sun'.*

*Kaj tio, kio igis min pek-fara,
molidas eĉ la duran rokon nun.*

*Malnovaj pensoj ree pace fratas:
la sama koro, pli maljuna, batas.
Kaj ĉiu ŝton' konato al mi ŝajnas,
ĉar tio ĝi ja estis dum knabec',
kaj ree mi demandas, kiu gajnas,
ĉu tiu aŭ ĉu jena monta eĝ'.*

*Min ĉio memorige akompanas,
ĝis suno estingiĝas en la neĝ!
Kaj fine ĉesas bati mia koro,
lulata de ĉi ombro, ĉi memoro.*

El la norvega: Henry Fridén

malpuro, siaj eraroj. Sed vi, kiuj estas ĉirkaŭ mi, por ŝtonumi min, viaj manoj (rigardu en vin mem; faru tute sekrete kion mi deklaras tute laŭte), ĉu viaj manoj estas puraj?

TRANS LA ALTAJ MONTJOJ

Legendo

Iam estis lando ĉe la malsupro de granda montaro kun montoj tiom altaj, ke iliaj pintoj ne estis videblaj pro la nuboj. Nur en maloftaj belaj someraj tagoj oni povis videti la neĝkovritajn pintojn alte en la senfino. En tiu ebena lando apud la altaj montoj vivis malgrandaj homoj, kiuj ne prirevis, ke estus eble transpenetri la montojn kaj eble trovi ion malantaŭ ili . . . "Ni ja vivas bone ĉi-sube en la valo", ili diris, "do kial ni okupiĝu pri altflugaj spekuloj pri io trans la altaj pintoj?"

Sed vivis inter la popolo legendo pri pasejo, tra kiu oni devus povi transiri la montojn al belega lando malantaŭe. Neniu iam estis tie, sed oni rakontis legendon pri viro, kiu iam antaŭ centoj da jaroj venis de la alia flanko, kaj lin bonvenigis la popolo en la valo kiel grandan profeton. Li instruis ilin pri multo, sed nun la plejmulto estis forgesita, ĉar la saĝuloj de la popolo komentariis lian instruon kaj predikis pri ĝi ĉiu en sia maniero dum jarcentoj. Kaj nun neniu plu sciis, kion li fakte celis per sia instruo.

De la valo kondukis du vojetoj sur la montdeklivon. Ilia nomo estis La Vojeto de Liriko kaj la Vojeto de Literaturo, kaj ambaŭ kondukis al la sama loko sur la montdeklivo. La Vojeto de Literaturo kondukis rekte al la celo, sed La Vojeto de Liriko serpentumis tra la plej belaj valoj kaj plej ĉarmaj arbaretoj. Ambaŭ ili kondukis tra belaj pejzaĝoj, kaj multaj homoj vespere promenis sur ili por ĝui la belecon de la naturo kaj la kantadon de la birdoj. En la loko, kie la vojetoj renkontiĝis, esti ĉarma lageto

ĉirkaŭe kun palmoj. De tie oni povis videti montan pasejon alte super si en la dezerta regiono, kaj maljunuloj rakontis, ke tio estas la pasejo kiu kondukas trans la montojn. Multaj daŭrigis siajn promenojn ĝis la lageto kun la belaj palmoj, kie ili kuŝiĝis ĉe la bordo kaj trinkis akvon el la vivigaj fontoj. Kaj multaj ekloĝis tie.

Sube en la valo loĝis junulo, kiu ofte promenis sur la Vojeto de Literaturo al la lageto. Li decidis esplori la montojn pli supren kaj provi transiri la pasejon al la belega lando. Iun tagon li ekiris laŭ la Vojeto de Liriko al la lago, kie li restis dum iom da tempo por kolekti forton por la plua marŝo. Baldaŭ li trovis vojeton kondukante supren de la lago. Ĝin li nomis la Vojeto de Religio. Li laŭiris ĝin tra grandaj arbaroj kaj trans dezertajn ebenaĵojn. Tio estis longa kaj peniga marŝo, sed fine iun tagon li staris ĉe la finaĵo de la vojeto. Ĝi finiĝis sur granda montplataĵo kovrita de mola herbaro, kaj alte starante super tre profunda malhela abismo. Tiun abismon li nomis Abismo de Malbono. Tie renkontis lin la plej bela panoramo, kiun li iam vidis. Super neĝkovritaj montopintoj kaj profundaj arbkovritaj valoj kun riveroj kaj akvofaloj. Li kuŝiĝis sur la verda herbaro por refreŝigi sian animon per la rigardo de la grandioza pejzaĝo, kaj iom refortiĝi antaŭ la ekserĉo de nova vojeto pli supren.

Baldaŭ post la refreŝiĝo li trovis vojeton pluen kondukantan tra la impona pejzaĝo. Tiun vojeton li nomis Vojeto de Filozofio. Ĝin li laŭiris tre, tre longe, kaj li tre laciĝis. Li devis

transalti abismojn tiel profundajn, ke li eĉ ne povis videti la fundon, kaj li devis grimpi sur rokoj tiel glataj kiel glacio. Post migrado preskaŭ senfina, la vojeto subite finiĝis, kaj li nun estis sur grandega altebenaĵo kovrita de grandaj ŝtonegoj kaj rokoj, envolvita en stranga dubeverda nebulo, kiu kaŝis ĉion en nerealeca lumo. Tie li restis iom da tempo por provi trapenetri la nebulon de nerealeco ĝis la substanco de la objektoj. Sed ju pli li provis, des pli la nebulo densiĝis. Fine li ne vidis alian solvon ol rapide serĉi novan vojeton pluen.

Post iom da palpado li trovis tian vojeton kaj nomis ĝin Vojeto de Scienco. Ĝi kondukis lin en tute rekta linio trans la nepaseblan terenon. Ĉe la rokfendego kuŝis grandaj arbotrunkoj, tiel ke li povis rekte transiri, kaj kiam li venis al altaj rokoj, kavernoj trapenetris ilin. Laŭ tiu vojeto li rapide antaŭenvenis, balancante sur arbotrunkoj trans profundajn abismojn, kaj migrante en kavernoj tra grandaj montoj. Kaj fine li staris ĉe altebenaĵo kun multaj rokoj kaj rifoĵoj, kuŝantaj en rektaj vicoj tiel, ke ili formis geometriajn figurojn. Ĉio estis sisteme aranĝita, kaj inter la rokoj estis labirinto de vojoj kaj vojetoj. En tiu labirinto li ĉirkaŭvadis dum tre longe da tempo, kaj fine li povis vidi nek komencon nek finon. Sed tamen: La feliĉo helpas la kuraĝulon, kaj iun tagon li elvenis el la labirinto kaj staris nun ĉe la pasejo, kiun oni povis videti de la lageto kun la belaj palmoj. De ĉe-tie li povis profunde sub si vidi la lageton kaj eĉ homojn kuŝantajn sur ĝiaj bordoj. Sed nun subite la vido ŝajnis al li banala, kaj li rapide turnis sin al la pasejo, lia unua celo. La pasejo sin montris esti rokfendo kondukante — ne al iu belega lando — sed al granda altebenaĵo kun ne-trairebla marĉo. La marĉon kovris

dika tavolo de ŝtonegoj kaj argilpecoj en formo de strangaj figuroj. Fore, trans la marĉo li povis vidi alian pasejon, kiu ŝajnis konduki trans la montojn. Li subiĝis ĝis la kolo, kiam li volis provi transiri la marĉon. Tiam li ekploris, ĉar li nun komprenis, ke li neniam povos transiri al la alia flanko de la montoj. Sed nun li aŭdis voĉon dirantan: "Vi venis al la Ebenaĵo de Percepto. Ĉi-tie vi trovos ŝtonegojn en formo de figuroj kaj simboloj el religio, filozofio kaj scienco. Se vi kapablos kunmeti tiujn figurojn ĝustamaniere, ili kreos mozaikon en formo de ponto, laŭ kiu vi povos transiri la marĉon al la pasejo, kiu kondukos vin al la lando, kiun vi serĉas."

Li tuj komencis la malfacilan laboron. Pasis multaj jaroj, sed iun tagon li finis la laboron. Tamen li ankoraŭ havis unu figuron, por kiu li ne povis trovi lokon en la mozaiko. — Tiu figuro estis koro. — Li decidis tamen provi la ponton. Tre singarde li faris la unuan paŝon sur ĝin. Sed ho ve, ĝi disfalis, kaj nur apenaŭ li evitis subiĝi en la marĉo. Nun li do povis defunde rekomenci. Sed ĉi-tiun fojon li komencis per la koro, kaj konstruis la tuton ĉirkaŭ ĝi. Baldaŭ la ponto estis preta, kaj nun ĝi estis pli solida. Li transiris ĝin kaj staris ĉe la pasejo al la alia flanko de la montoj. De tie li povis vidi sub si ebenan landon similan al la lando de kie li venis. Kaj sur la montdeklivo estis precize la samaj vojetoj kaj la sama lago kiel sur la alia montdeklivo... Post longa migrado li venis suben en la ebena lando, kie vivis malgrandaj homoj, kiuj ne prirevis, ke estus eble transpenetri la montojn kaj eble trovi ion malantaŭ ili. "Ni ja vivas bone ĉi-sube en la valo", ili diris, "do kial ni okupiĝu pri altflugaj spekuloj pri io trans la altaj pintoj?"

Sed nun post la longa migrado kaj

kun la spertoj, kiujn ĝi donis al li, la ebena lando ŝajnis al li la plej bela loko de la mondo. Li lernis dezirtion, kio estas atingebla. Ĉar tio estas la sekreto de la plenumiĝo de deziroj... Li rakontis al la popolo pri siaj spertoj kaj pri la Ebenaĵo de Percepto. Kaj la popolo akceptis lin kiel grandan profeton, kaj multaj sekvis lin por ricevi instruon pri la ĝusta uzo de la simboloj el religio, filozofio kaj scienco. Sed la plejaĝuloj de la popolo ne deziris, ke iu lernu konstrui pontojn per aliaj rimedoj ol tiuj, pri kiuj ili instruis la popolon, do ili iris al la reĝo por plendi. La profeton oni forpelis de la lando, kaj li plu-vagis tra multaj landoj. Ĉie, kien li venis, li instruis al la popolo pri siaj spertoj, kaj ĉie li estis forpelata.

Multaj el liaj lernantoj en la lando apud la grandaj montoj mem ekmigris sur la monton por lerni pli multe, sed la plej multaj restis ĉe la lageto kun la belaj palmoj. Kelkaj plumigris al la Plataĵo de la Religio kaj restis tie. Aliaj atingis la Ebenaĵon de la Filozofio, sed restis tie, kaj ankoraŭ aliaj venis al la Ebenaĵo de Scienco. Sed nur malmultaj trovis la vojon tra la labirinto ĝis la Ebenaĵo de Percepto, kaj nur unu kapablis konstrui la Ponton de Percepto.

Tiuj, kiuj laŭiris la Vojeton de Religio, revenis al la popolo kaj rakontis pri la panoramo kun la blankaj pintoj kaj profundaj valoj, kaj pri la Abismo de Malbono. Tiuj, kiuj laŭiris la Vojeton de Filozofio revenis kaj rakontis pri la profunda mistiko sur la Ebenaĵo de Filozofio, kaj tiuj, kiuj laŭiris la Vojeton de Scienco rakontis pri la totala reguleco kaj ordo sur la Ebenaĵo de Scienco. La malmulto, kiu atingis la pasejon ĉe la Ebenaĵo de Percepto revenis kaj rakontis pri la netrairebla marĉo: kaj tiu, kiu transiris la ponton, neniam revenis.

Ludmila Jevsejeva

TELEGRAMO

*Hodiaŭ ni atendis gastojn,
Sed jen, alvenis telegram',
Ne povas ili partopreni
En la vespera festprogram':*

*Kun termoforo sur la ventro
Malsana kuŝas la vesperto.*

*Hieraŭ al solida strigo
Fuŝrompis okulvitrojn pigo.*

*Al urso, dum la vintra frostoj,
Sensigne malaperis vosto.*

*Serĉante en ĝarden' karotojn
Leporo straba perdis botojn*

*Kaj ne kuraĝis kokcinelo
Al festo flugi sen ombrelo.*

*Jen kia historio estas,
Pri tio telegram' atestas.*

Kaj la popolo kreis asociojn ĉirkaŭ la diversaj saĝuloj, kiuj revenis de siaj migroj. Tiuj asocioj reciproke interbatalis kaj ĉiu el ili konsideris kiel sian profeton la viron, kiu transiris la Ponton de Percepto. Ili diris, ke li transiris la ponton pro ili, kaj unu nur necesis kredi je la beateco de la panoramo kun la blankaj pintoj kaj la profundaj valoj, la mistiko sur la Ebenaĵo de Filozofio, aŭ la racia ordo sur la Ebenaĵo de Scienco, por mem esti portata trans la montojn al la belega lando. Sed nur post la morto ili atingos tien.

Kaj se iun tagon la viro, kiu transiris la Ponton de Percepto revenos kaj rakontos al ili, ke ili mem vivas en la belega lando, ili forpelos lin per moko kaj rido, ĉar *ILI* scias la tutan veron...

Willy Nielsen.

EDMOND PRIVAT (1889–1962)

"Mi timas... kaj mi tamen eĉ pli akre — suferos, se vi nun foriros. Kial — Ni devas ĉiam timi, timi? Kial — Ekzistas en la mondo nigraj manoj — Por krei ĉie timon kaj suspekton?"

El "Ginevra kaj Lanceloto" (E. Privat).

Prof. d-ro Edmond Privat mortis la 29-an de aŭg. Nin kaptas la sama doloro, kiun oni sentas ĉiam, kiam iu, tute organisme apartenanta al nia vivo perforte elŝiriĝas el niaj tagoj. Prof. Privat tute apartenis al Esperanto, al kiu li dediĉis proks. 60 jarojn el siaj 73. De la jaro 1903, kiam li, ankoraŭ infano fondis la gazeton "Juna Esperantisto" ĝis la morto li plenumis kolose ampleksan rolon en niaj movado kaj kulturo, kiel pedagogo, edukisto de la pura pacisma moralo, lingvisto, brila oratoro, redaktoro, eseisto kaj beletristo, historiisto de Esperanto. "De siaj fruaj knabaj jaroj... li marŝis sur la vivo-vojo riĉa de sukcesaj bataloj, noblaj venkoj kaj kiel klera plumlancisto per ĉiu verko li okupis pli altan pozicion". — diras pri li J. Baghy. En sia juna periodo Privat verkis ankaŭ poemojn kaj la versdramon Ginevra (1913), kaj lia viva, natura kaj klara lingvofonto donis kristale freŝan forton al novicoj, kiuj ankoraŭ serĉis

sian vojon en la arbaro de vortoj, pensoj kaj sentoj. En neniu sia verko Privat reprezentis nur unu artospecon, sed ĉiam la plenan vivon, kie miksiĝas la diversaj inspiroj kaj tial eĉ liaj emfazaj kaj elegantaj historiaj verkoj donas la impreson de eterna klasika belo, kiu esence apartenas al la epiko same kiel al la lirikeco.

Edmond Privat atingis altan pozicion en la erudicia vivo en sia patrujo kaj ekster ĝi, kiel prestiĝa fakulo de la "interpopolaj" problemoj; "esperantiste" li daŭrigis kaj aplikis la homaranismon konsekvence, solide kaj fidele dum la plej mallumaj tempoj de la homa historio. La memoro de tiu ĉi alloga, gravega kaj ĉiesfrata geniulo vivos eterne en ni: laŭ la metaforo de K. Kalocsay: "*Edmond Privat — la dolĉa Vorto!*" Nian profundan kondolencan ni esprimas al lia vidvino.

Fine jen grupigo de liaj plej gravaj verkoj:

Lernolibroj: Karlo (18 eldonoj), Kursa leĝolibro (15 eldonoj).

Historio: Historio de Esperanto. Vivo de Zamenhof.

Lingvistiko: Esprimo de sentoj en Esp.

Internaciaj problemoj: Interpopola konduto. Federala sperto.

Kolektitaj verkaĵoj: Junaĝa verkaro (poezio, dramo, eseo pri la E. literaturo).

Walery Wiecko

PRINTEMPO

Debutpoemo de nia kunlaboranto pola.

*branĉo nuda senfolia
eknestis sur ĝi sunstrio
gravediĝis burĝono
io movetigis
elsaltis folio
unu du
la arbo verdas*

Emilia Chopin (1813—1827)

LASTA POEMETO

Emilia Chopin estis la plej juna fratino de la granda komponisto kun esperigaj talentoj kaj — mortiga tuberkulozo, kiu tondis la vivfadenon de la 14-jara infano.

Morti jen por mi la sort'.
Mi ne timas pro la mort'.
Sed mi larmas pro l'ango
Morti en via memoro.

El la franca: *Armand Su*

HOMO EN LA SPEGULO DE SIAJ STATUOJ

Dum la somerferio ni pasigis sunbrilajn tempojn en Hungarlando. Iom post iom ni prilaboros niajn impresojn. La plej memorindajn travivaĵojn stampis la kultura kaj arta vivo. Oni ne povas forgesi ekz-e la impulse brilajn operprezentadojn de la grandioza festivala semajno en Szeged; la aranĝojn de la dutaga *landa* Esp.-jubileo de la hungaraj E-istoj en Budapeŝt, kiun ĉeestis ne malpli ol 750 E-istoj, kaj ĝiajn belajn programerojn, kaj laste-nelaste la valorajn renkontojn kun malnovaj kaj novaj ĝeamikoj, ĉefe kun la artistoj de la vortoj kaj bildoj.

En ne-granda monteta vilao, tre agrabla medio en malnova pitoreska budapeŝta urboparto ni renkontis simpatian paron: la edzino, verkistino (Z. Nagy) prezentigis poste, la edzo: grava skulptartisto, e-isto, portretiĝas jene kune kun la mondo, en kiu li vivas:

Ibsen diris: "Krei signifas konfesi." Montru viajn verkojn, mi diros, kiu vi estas.

Romano, dramo, poemo preskaŭ logas nin serĉi inter la linioj; trovi la trajtojn de la majstro. La spaco, la tempo, la impulsoj, agordoj, la vivuloj kaj objektoj, la naturo kaj la tekniko estas kolormakuloj sur la paletro de la beletristoj. Kion li elektas el la koloroj, ĉu li prezentas per ili molon aŭ forton, kian juĝon li diras pri la temo, kion li prisilentas, kvazaŭ malkaŝas la aŭtoron.


Sed, ĉu tio validas ankaŭ, kiam temas pri bildartisto: ĉu oni povas el la verkaro de skulptisto konkludi pri la skulptisto mem? La prirakontebla mondo estas simple senlima, dum la skulptisto laboras ja nur pri fragmento de la videblaro, kiu el la universo estas prezentebla. Objektoj nur kiel akcesoraĵoj povas havi rolon; kiam la majstro volas klare esprimi la plej kontrastajn kaj diversajn ideojn kaj sentojn, ĉiujn li devas aperiĝi per la

homa korpo, kiun oni jam nove kaj denove ripetadas sen aliaj ebloj de post la pratempo de la arto.


Estas do strange post ĉio ĉi, ke ni provas vidi la homon *Tamás Gyenes*, helpe de siaj kelkaj skulptaĵoj, prezentotaj ĉi tie. Tamen tiu ĉi vojo estas la plej natura al li, ĉar de kiam li ekprenis la modlilon kaj ĉizilon, li deklaras ke la artisto kaj la verko devas paroli la saman lingvon kaj porti la saman mondpercepton.

Unue jen kelkaj vortavaraj biografiaj notoj: Li naskiĝis en hungara vilaĝo, Pécsvárad, en la jaro 1920. Li komencis siajn artakademiajn studojn en 1941 kaj apartenas al la generacio, kiu pro dua mondmilito, en 1945 devis kvazaŭ rekomenci sian vivon. Post la finstudado de la Artakademio en Budapeŝt li iĝis adjunkto, kandidato, poste docento kaj jen ankaŭ li mem iĝis pedagogo por la servo de novaj bildartista kaj arkitekta generacio.


Liaj ne-grandaj skulptaĵoj prezen-



T. Gyenes: János Hunyadi.



T. Gyenes: Knabeto kun aviadilo.



T. Gyenes: Projekto de memormonumento:
Auschwitz.

tiĝas ĉiujare en diversaj ekspozicioj, liaj monumentaj verkoj ornamas placojn aŭ aliajn publikajn lokojn de Budapeŝto kaj ceteraj hungaraj urboj. En 1956 por monumento kaj portretoj li ricevis la premion "Munkácsy". Depost 1957 li estas aktiva esperantisto.

Kaj nun: kion malkaŝas pri Gyenes kvin, el lia verkaro kvazaŭ hazarde elektitaj verkoj?

"Knabeto kun paperaviadilo" estas statuo, 1,40 m-ojn alta, kreita el

bronzo, kiu staras ĉe eniro al buda-peŝta ludlernejo. La verko kaptas epizodon el la infanvivo. La knabo streĉas sin, kolektas ĉiujn siajn fortojn, ke la papermaŝino flugu laŭeble plej malproksimen. La artisto bone vidas, ke tio por la plenkreskulo nur estas ludo; por la infano tiumomente kvazaŭ vivgrava problemo, respondeplena entrepreno. La intimeco de la temo kaj la koncentrita atento de la knabeto, la konflikto inter la kontrastoj naskas la dinamikan streĉon de la statuo. Kaj ĝuste tiu ĉi streĉo donas iom pli ol nuran plastikan travivaĵon; ĝuste per ĝi ricevas la rigardanto la admonon, gravigi ĉiun homan aktivecon kaj estimi tion same ĉe ludanta infano kiel ĉe genia sciencisto.

La portreton pri *Albert Schweitzer*, kiun Gyenes faris laŭ fotoportreto, ankaŭ la "modelo", la Nobelpremiita kuracisto, filozofo, misiisto kaj orgenartisto konas. Kiam li vidis la foton pri la statuo, jene li respondis al la artisto: "La portreto estas vere bonega". "Mi miras, ke iu povas krei laŭ nura foto tiel sukcesan verkon". Ne nur la granda estimo al la pensulo inspiris la artiston, la fortoplena filozofa kapo ne nur eternigas la trajtojn de la grandulo, sed metas lin kiel ekzemplon antaŭ la homojn, "Kiu ajn vi estas, kiun ajn profesion vi havas, neniam lasu narkoti vian konsciencon, Sentu respondecon por ĉiu esenca afero de la mondo, unuavice por la paco kaj humanismo kiel Albert Schweitzer".

Tiu ĉi penso plifortiĝas je ĝismedole penetranta krio en la projekto pri "Monumento Aŭŝvica" (Auschwitz). Al la neatentintoj de la mallaŭtaj avertoj patrino, tenanta sian mortintan infanon elkrias la moralon, por kiu ŝi mem kaj multaj milionoj pagis tiel teruran prezon: "Neniam plu faŝismon!"



T. Gyenes: *Kampulo.*

La arto de Tamás Gyenes elradias bonan patriotsenton en la artisto per la genia statuo de Johano Hunyadi, kies kolosa rolo en la turkaj militoj antaŭ kvincent jaroj estas konata en la tuta mondo. La statuo donas okazon al la artisto proksimigi al ni la genian armeestron, la ofereman ŝtatestron, kies potenca energio kombiniĝis kun saĝa celkonscio kaj gvidis lin kaj liajn armeojn al la celo, defendi nian kulturon.

Sed la artisto ne starigas monumenton nur al la unikaj batalantoj de la pasinto, sed ankaŭ al la simpluloj de la nunaj labortagoj. Li pasigas nun la kvaran someron en ŝtata bieno, kie li eternigas la trajtojn de dignaj kampuloj, bestvartistoj, traktorestroj. La frateco, kiu la artiston ligas al siaj kampulherooj kaj la simpatio, per kiu la biendungitoj akceptas de jaro al jaro sian "propran artiston", gardas la skulptiston de senfrukta memcela artistapombo. La artisto, kiu trovis sian publikon kaj sian direndon, ne vivas vane.

S. N.

Emba (1902—1961)

SOMERO

*Varmego en la sango — bolegas la
aero,
Instinktoj maturiĝas je ĝojo, je sufero.*

*Sopiroj ĝuavidas — bruligas jen la
Suno,
Rapidu ĉe voluptoj, se gravas nur
la nuno!*


*Sovaĝaj amoj, kisoj — grenkampoj
grajn fekundaj,
Hastigu la rikolton de ĝuoj nur
sekundaj!*

*Flamantaj amintimoj — jen monto
de la juno,
La tagojn retenadu ĉar venos la
aŭtuno!*

*Jen ĉirkaŭprenoj ardaĵ — filandroj
foras naĝe,
Pasadas la somero, ne haltu mal-
kuraĝe!*

*Somero: la virino — sukplena vege-
taĵo,
La longo de la vivo apenaŭ kelka
paŝo . . .*

*Forpasas tag' post tago: aŭtuno flave
palos,
Folioj de juneco ĝemspire falos . . .
falos . . .*



ANNA

Trabo el sunlumo kline fluis tra la fenestro al la planko; kaj sur la fono de la ombra preĝejo, ŝajnis preskaŭ solida. Tamen travidebla: tra la eterne dancantaj polvoj, Anna povis vidi la vizaĝon de la Virgulino, en ombro, sed sublumata de la reflektito de l'planko. En tiu bela lumo, ŝajnis, ke ŝi flustras karesajn amajn vortojn al la dolora koro de Anna.

Ŝi ne konsciis la kadencan voĉon de la pastro oficanta la meson, nek la odoron de incenso, nek la arĝentajn ondetojn de la sonorileto. Ŝi fiksita la rigardon sur la vizaĝo de la Virgulino, el kiu fluis paco kaj kuraĝo; sed ŝiaj pensoj metis antaŭ ŝiaj okuloj ankaŭ bildojn de la pasejo; dum kelkaj momentoj, la bildoj de la futuro malaperis. Ŝi ne konsciis eĉ la edzon kaj la ok-jaran filinon, kiuj sidis eĉ ŝia flanko kun klinita kapo.

La unua fojo, kiam la Virgulino parolis al ŝi. Kiam? Ne en la monaĥineja lernejo, kvankam jam en tiu epoko ŝi sentis sin dediĉita al la Reĝino de la Ĉielo. Ne en la maloftaj tagoj antaŭ ŝia edziniĝo, kiam ŝia animo estis trankvila kaj sentima, kvankam eĉ tiam la amo de la Virgulino promesis levi la pezan ŝarĝon de ŝia koro. Kiam? La peno por pensi ekrevenigis la teruran, blindigan doloron en ŝia kapo, kaj ŝi lasis sian atenton malstreĉiĝi, kun senvidaj okuloj plenaj je sunlumo, sed kun ombro nun sur la animo.

Nun venis aliaj bildoj; bildoj en kiuj ĉiu ombro minacis hororon. La jaroj kiam ŝi studis la flegarton kaj akiris sian diplomon; kiam ŝi eksciis,

ke la homoj malamas ŝin, kaj volas malliberigi ŝin en malluma karcero. La fruaj jaroj de la edzineco, kiam eĉ ŝia edzo volis fari al ŝi malbonon kaj komplotis kontraŭ ŝi kun aliaj. La tago kiam ŝia torturata animo ne plu povis elteni la doloron de soleco, de persekutiĝo, kiam ŝi vidis la spiritojn, kaj la kadavrojn, kiuj embuskis ŝin en la ne plu familiara hejmo. La semajnoj en la hospitalo, kiam la kuracistoj torturis ŝin, kaj nur per ruzo kaj ŝajnigo ŝi povis eskapi. La epoko, kiam eĉ la Virgulino fortunis sin de ŝi, kaj eĉ dum la sankta meso lasis ŝin sola kaj damnita.

Ne, ne, ŝi konfuzo pensis, mi ne pensu pri tio; tio ne estas vera. Ŝi refokusis la okulojn por rigardi la Virgulinon, kaj denove, tra la sunlumo kaj la dancantaj polvoj, tiu vizaĝo ridetis al ŝi, kaj promesis pacon. Kun larĝe malfermitaj okuloj, Anna senvorte preĝis. Ne lasu min. Vi scias, kio devos okazi al mi baldaŭ. Ne lasu min sola. Sola. Sola. Neniu alia povos helpi — ne lasu min eniri la mallumon sola.

Denove la frakasa doloro premeĝis ŝian kapon; denove ŝi fermis la okulojn por kaŝi la timon kaj doloron; kaj kiam ŝi iom foriĝis denove, ŝi daŭrigis sian preĝon. Gardu kaj protektu mian filinon; faru, ke ŝi amu vin kaj restu sekura en via amo. Kaj benu mian edzon; li estas bona homo.

Nun, malantaŭ la fermitaj okuloj, ŝiaj pensoj vagis senvole al ŝia hejmo. Ĉion ŝi devas lasi en bona ordo, ĉion tiel pura, ke ŝi ne timos la filinon kaj la edzon. Ŝi mense ordigis siajn tas-

kojn: kuirado hodiaŭ, ankaŭ por morgaŭ kaj mardo; lavado de la vestoj kaj tolaĵoj; lavado de la plankoj kaj fenestroj; polurado de la mebloj; kreo de perfekta kaj bela, iel sekuriga ordo en la ŝrankoj kaj tirkestoj. La brilanta, pura, bonodora hejmo de deca dommastrino. Kaj la lastaj konsiloj al la filino kaj al la edzo: tiujn ŝi jam pretigis parkere, por doni en la postaj tagoj senemfaze, por ne averti aŭ timigi ilin. Sen malfermi la okulojn, ŝi sentis la rideton de la Virgulino, kaj sciis, ke ŝi aprobas, kaj ke ŝi ne lasos ŝin sola, eĉ kiam ŝi devos eniri la solecon. Kaj dum kelkaj sekundoj malaperis el ŝia koro la timo kaj ploro, kaj ĝin plenigis luma paco, kiu estis sama kiel la sunlumo kiun ŝi vidis tra la palpebroj, sama kiel la varmo kiun ŝi sentis sur sia kapo. La tempo ne plu estis; ŝi konsciis ekster la tempo.

Subite ŝi sentis, ke la filino kaj la edzo ekstaras, kaj ŝi aŭdis la unuajn harmoniojn de la orgeno. Kun suspiro, kiu ŝajnis tute malplenigi ŝin, ŝi ankaŭ ekstaris, kaj senvide atendis la finon de la himno, kaj la adiaŭan benon de la pastro, sen tamen aŭdi ilin: parto de ŝi estis en la tempo, parto ekster ĝi; kaj estis dolore reveni.

Hejme, ŝi rapide preparis la tagmanĝon, kaj konsiladis la filinon pri prizorgo de la vestoj, pri sinlavado, pri regula preĝado. Antaŭ la manĝo, ŝi prenis unu el la piloloj, kiujn donis al ŝi tiu kuracisto, amiko de la edzo, kaj denove miris pri ilia efiko. La kuracisto nomis ilin toniko por refortigi ŝian korpon, lacan pro luktado kun la timoj, kiuj de la infaneco malmulmigis al ŝi la vivon. Dum la lastaj kvarmonatoj, en kiuj ŝi prenadis ilin, ŝi sentis sin ĉiam dormemeta, sed trankvila: ili forigis la timojn kaj suspektojn, kaj tiuj monatoj estis la

plej feliĉaj de ŝia vivo. Sub la surfaco de la konscio, ŝi, flegistino, sciis, ke tiuj piloloj estas sedativoj, kiujn antaŭe, pro la komplotoj kaj insidoj de la homoj, ŝi estis ĉiam rifuzinta preni; sed nun tiuj suspektoj ne povis leviĝi al la surfaco.

Dum la manĝo, ŝi estis preskaŭ gaja, kaj denove ŝi sentis dankema pro la solideco kaj subteno de la edzo, kaj ŝi ĝojis, vidante la kontentecon kaj la trankvilecon, kiujn sentis ankaŭ li de kiam ŝi ekprenadis la pilolojn.

Sed post la manĝo, la kapdoloro revenis, kaj kiel ofte dum la lastaj semajnoj, ŝi vomis. Bonŝance, la edzo tiam dormis, kaj la filino estis for en vizito al amikinetoj, kaj neniu vidis ŝian malfortecon.

London matene ŝi estis laca, dormema, sed sukcesis trankvile forsendi la edzon al la laboro kaj la filinon al la lernejo. Poste, antaŭ ol komenci la urĝajn laborojn, kiujn ŝi devos fini en la venontaj tagoj, ŝi reprenis la lernolibron por flegistinoj, kiun ŝi gardis jam dudek jarojn, de kiam ŝi estis fleglernantino, kaj denove legis la ĉapitron pri la encefalito kaj pri cerbaj tumoroj. Jen la simptomoj; jen la progreso de la malsano; jen la fino: kapdoloroj, vomo, sveno, konvulsioj, senkonscio, kaj . . . Ŝi deturnis la penson for de la fino, sed tamen profunde konsciis ĝin. Ne estas dubo; kaj la tempo mankas. Kun longa suspiro, ŝi letargie leviĝis, kaj pelis sin al la lastaj laboroj; la lastaj lavado, purigado, ordigo, briligado. Tiun tagon ŝi ne povis fini ĉion; sed ŝi esperis, kaj kredis, ke morgaŭ ŝi havos sufiĉan tempon.

Mardon ja sufiĉis tempo, sed apenaŭ. Dum la soleca mateno, la kapdoloro ŝajnis blindigi ŝin, kaj post kelkaj momentoj, kun konvulsiaj movoj, ŝi svenis. Sed revenis al si, kaj penegis,

malrapide, antaŭen puŝis la taskojn ĝis la perfekteco. Vespere ŝi estis senforta, kaj devis peti al la edzo, ke li preparu por si kaj por la filino la vesperan manĝon. Kaj ŝi atendis la ĝustan momenton por konsili lin, kaj kaŝe ricevi lian promeson. Ŝi diris, ke ŝi ne bone sanas, kaj demandis, ĉu li scias, kion fari, se ŝi svenos. Unufoje, kiam la kapdoloro estis pli forta, ŝi eĉ konfesis al li, ke ŝi estas tre malsana, kaj bezonas kuracon en hospitalo. Sed neniam antaŭe ŝi estis korpe malsana, kaj li ne povis kredi, ke tiel malsana ŝi nun estas; kaj li klarigis al ŝi, ke mankas al li mono eĉ por pagi la hipotekon de ilia domo; sed li promesis alvoki kuraciston morgaŭ.

Dum la nokto, la doloroj kaj la anima mallumo denove ĉirkaŭis ŝin en soleco, kaj ŝi silente ploris, kaj nur iom antaŭ tagiĝo ekdormis. Tamen, kiam venis la plena tago, unu fojon plu ŝi sukcesis leviĝi, kaj kiam la edzo kaj la filino estis foririntaj, ŝi sukcesis finpretigi la domon por la virinoj, kiuj venos kiam ŝi ne plu estos.

Tiun nokton komenciĝis la febro, kaj pli fortis la doloro; kaj dum ioma tempo ŝia kuraĝo ŝanceliĝis. Ŝi eltenis ĝis longe post noktomezo, sed tiam ne povis plu. Ŝi iris al la lito de la edzo, kaj petis, ke li lasu ŝin kuŝi apud li, por varmiĝi. Li metis brakon ĉirkaŭ ŝi, kaj redormis. Dume, ŝi, maldorme, pensis pri la proksima mallumo, kaj provis tiri iom da sekureco kaj da kuraĝo el lia korpo, el lia proksimeco; sed ne multe konsoliĝis. Fine, por ne plu ĝeni lian ripozon, ŝi reiris al la propra lito, kaj atendis la taglumon.

Antaŭ ol la edzo foriris al la laboro, ŝi eltiris el li la lastan promeson: ke se iam ŝi mortos, li neniam forlasos la filinon, sed ĉiam prizorgos ŝin, kiel ŝi mem faris. Li ame mokis ŝian senbazan antaŭtimon; sed promesis, por trankviligi ŝin. Poste ŝi donis al la

filino longan kison, kaj konsilis al ŝi bonajn aferojn, kaj forsendis ŝin.

Kaj tiam Anna estis sola: pli sola ol iam ajn, eĉ kiam ŝi estis torturata de la kuracisto; pli sola, ĉar en la nuna momento ŝia menso estis klara, kaj ŝi sciis, kio okazos post kelkaj horoj, eĉ post kelkaj minutoj. Kun doloroj kaj timoj, senforta, ŝi kuŝigis sin sur la lito, kaj atendis... atendis... kaj pensis pri la parencoj kaj amikoj, kiujn ŝi antaŭe timis kaj malamis; sed nun ŝi memoris nur, ke ili helpos al la edzo kaj prizorgos la filinon. Kaj ŝi preĝis por la edzo, kaj por la filino, kaj dankis al la Virgulino, ke ŝi donis al ŝi tiajn amatojn. Kelkfoje la Virgulino ŝajnis tre proksima al ŝi: ŝi povis ne vidi, sed senti ŝin proksime de sia kapo; sed kelkfoje, precipe kiam la doloroj estis pli fortaj, ŝi ŝajnis tre malproksima.

Kiam la suno subiris, la edzo kaj la filino revenis al la domo. Ŝi pene, malrapide, leviĝis, kisis la filinon, tiam turnis sin al la edzo, por doni ankaŭ al li la bonvenigan kison; sed en tiu momento ĝi okazis: la fino kaptis ŝin. Konvulsie ŝi rigidiĝis, kaj falis; sed ĝuste en tiu momento, antaŭ ol eniri la lastan, senfinan nokton, ŝi klare vidis la Virgulinon, kiu atendis ŝin kun bonvenigaj, amaj brakoj.

La mallumo kovris ŝin, kaj neniam plu leviĝis.



EL "LA ANGLA PILOTO"

„ . . . Diru al mi, kapitano,
 kio tiel brile turas,
 kie lim' ĉiela kuras
 kune kun la oceano?
 Ĉu la blanka dorso fore,
 de nubmonto, kiu falis
 sub la brov' de l' horizonto?
 Multaj glore
 pentris landojn, kiuj palis
 kiel la miraĝa fonto!

— Ho, ne tiom blankas nuboj!
 Eble bloko
 de sunbrila glaci-roko,
 ekster dubo
 ŝtormpelita de l' poluso,
 drivas tie kun la fluso?
 Aŭ ĉu estas blanka spano,
 ŝaŭmokresta, de l' ondaroj,
 rekte de la novaj maroj,
 de l' Atlanta Oceano?

Povus esti falsa signo
 pri hejml-flugo de la cigno!
 Tiam ĉe la horizonto
 certe tuj formiĝus fronto;
 je l' unua avert-krio
 de l' taĉmento
 ree tuj disigiĝus ĝi, do,
 kiel neĝ' en kirla vento.

Ĉu la monda limo-zono,
 lim-linio de la maro
 al eternaj vel-vojaĝoj,
 el arĝenta perlo-ŝtono,
 streĉas sin en tiu klaro?

Ĉu ĉielaj or-palacoj,
 hela hejmo de libero,
 lumas transe tra l' aero?
 Aŭ ĉu l' mar-dezerto estis
 sino por ĉielaj astroj?

Ĉu samkiel lum-radio
 ĝi el la profundoj kreskis

TRANSTERA SOPIRO

Mia trezor' floranta, kun haŭto
 orvelura,
 Viaj okuloj gemaj kiel magnet'
 katenas,
 De ili mia koro printempan fajron
 prenas,
 Kvankam la haroj grizas de malju-
 niĝo dura.

Inter deliroj febraj de la volupto
 brula,
 Kiu purpuran sorĉon en nian sangon
 semas,
 El mia kor' sekrete sopiro mire tremas
 Al amo pli supera, pli nobla kaj pli
 pura.

Kaj lante sin transformas, per ia
 ŝanĝ' mistera,
 Nia ekstazo korpaj je ekzaltiĝ'
 transtera,
 Ĝis triumfinte, regas l' animojn ek-
 jubilajn

Mortvenka festa kredo, ke en sen-
 tempa foro
 De l'universo vasta, kiel magia floro
 Disfaldos nia amo petalojn etern-
 brilajn.

kaj reiris al la vastoj?
 Kiel glore, ho, por Dio
 ĝin rigardi en la bluo
 de l' senfunda mond-vakuo!
 Kiel en okulo tera,
 kie penso,
 bona, bela kaj tenera,
 brile breĉas tra la lenso!"

El la norvega: Henry Fridén

LA FLUIDUMO DE LA ĈIOVIDO

Pythius, la profesia animvidisto kaj aŭguristo dormis profunde en sia ĉambro. La horloĝo batis la dekduon. Apenaŭ la bim-bamoj forsonis, ekaŭdiĝis veaj ĝemoj, poste striga ululo, fine ĉentintado per kreskanta forto. Majstro Pythius vekigis. La ĉambrom transblis malvarma vento.

— Kio ĉi? — diris severe la majstro. — Kial tiu trablovo? — kaj li subite ekkriis: — Rabisto!

La veĝemoj kaj ĉentintado daŭris. Kaj nun eksonis mistika, tiritita voĉo: — Ho, vi mortemulo! Venis al vi kompatinda, peka animo!

— Ankaŭ mi konjektas, ke vi ne venis bonintence — diris la majstro, lumigante. — Ho! Vi survestis mian littukon! Tuj demetu kaj forportu vin! Forta, sana homo, ĉu vi ne hontas?

Sed la tomba voĉo plutremadis:

— Mi ne estas rabisto-o-o! Vaganta spirito-o-o mi estas!

— Nur vagu tuj for de ĉi tie, sed sen mia littuko, dum mi ne alarmos la domon!

La vento denove eksiblis. Pythius ĉirkaŭrigardis.

— Kaj kian trablovon vi faris! Sed kiel vi enrampis tra la duaetaĝa fenestro?

Pythius nur nun ekvidis, ke la fenestro estas fermita. La pordo same.

— Sed la fenestro . . . — li balbutis. — Sed tiam ŝajnas, ke vi vere ne estas rabisto . . .

— Mi ja diris, mortemulo, ke mi estas kompatinda, peka animo. El la transmondo mi venis.

— Do, fantomo?

— Tute laŭ viaj vortoj.

— Fine do! — ekspiris Pythius per

granda faciligo. — Vi tute timigis min. Mi ja kredis vin rompŝtelisto.

La maltimigo malgajigis la fantomon.

— Do, ankaŭ la nuna ne sukcesis! — li diris, jam per ne tombece, sed despli malgaja tono. — Ĉu tie ĉi jam neniu timas min? Kia malfeliĉa distrikto!

— Kial mi timu? Vi mem asertis, ke vi jam mortis.

— Ĉu vere? — diris la fantomo per surprizita kaj tute ordinara voĉo. — Ĉu la vivantoj faras pli efike la veĝemon kaj ventosiblon?

— Pri la vivantoj nur bonon, aŭ nenion. Cetere ni estas iurilate kolegoj.

— Fakte? Ĉu vi povas eligi kadavrodoron?

— Tiu ne koncernas la aferon. Sed mi estas animvidisto.

— Mi estis komercisto, sed antaŭ 50 jaroj mi bankrotis kaj kapenpafis min.

— Tiam ni estas duoble kolegoj, ĉar ankaŭ mi vivas el la klientoj. Al ili mi divenas la estanton kaj aŭguras la estonton. Mi povus diri, ke mi komercas en la estonto-fako.

— Kaj kiam vi kapenpafos vin?

— Kiel mi sciu?

— Ho! Do, vi ne scias eĉ vian propran estonton? Mi jam estas scivola, kiel vi tamen divenas. Ĉu vi permesas eksidi?

— Bonvolu! — kaj Pythius alŝovis seĝon.

— Dankon, ĝi estas iom malmola. Prefere mi sidos sur tiu lumfasko.

— Ĉu vi venas de malproksime, kolego?

— Nur el la najbaraĵo. Siriuso. Mi

ne kutimas ĉi tie fantomadi, nur anstataŭas. Sed la deĵoro estas tre laciga. Kvar-kvin klientojn viziti ĉiunokte, ululi, sibli ĉentintigi, kelodorigi... Aĥ!

— Ĉu mi rajtas servi glaseton de brando?

— Dankon. Mi ne estas alkoholisto. Eble iom da nektaro... aŭ astralfluidumo...

— Bedaŭrinde mi ne havas hejme. Eble morgaŭ mi ekprovos aĉeti.

— Vi ne sukcesos. Tiu ĉi estas spirita nutraĵo.

— Tiam ĉe la ŝtata literatura eldonejo.

— Mi jam diris, ke tiu ĉi estas spirita nutraĵo, do havas nenian komunan al via literaturo.

— Ho jes! Prave. Kaj kiel via negoco funkcias, kara kolego?

La fantomo rezigne mansvingis:

— Pli bone ne paroli pri tio. Sed nur foje mi ekvidu tiun friponon!

— Kiun?

— Sveĉjon.

— Pri kiaspeca Sveĉjo vi parolas?

— Pri tiu Swedenborg, kiun mi nun anstataŭas. Li diris al mi, ke li estas elsendita al la Andromeda Nebulo, do, mi bonvolu transpreni lian distrikton por kelkaj minutoj.

— Nu, tio baldaŭ finiĝos.

— Jes. Tiu faras ĉe la homoj sescent jarojn. Sed mi jam scias, kial li elsendigis sin!

— Kial?

— Ĉar tiu ĉi distrikto estas terura. Ĉi tie oni ne povas produkti. La kompatinda laboranta fantomo ĉi tie povas malsatmorti.

— Kial?

— Fi! La kompatinda peka animo venas por distriktvizito. Ĉe la kliento li ululas, siblas, kadavrodoras, ĉentintas, produktas ĉion eblan ĝis mortlaciĝo kaj la rezulto? Nenio! La

kliento vekiga ekterure, li demandas per malkuraĝa, tremanta voĉo: "kion vi deziras kamarada moŝto?" Post tio mi eligas kelodoron kaj tombvoĉe mi recitativas: "kompatinda, peka spirito venis al vi..." kaj tiam la kliento tuj ekridas: "kial vi teruras min, paĉjo?" Mi ne povas plenumi mian planon. Apenaŭ mi atingis tridek procentojn.

— Kion?

— 30-procentan produkton. Jen nia labortakso. Terurkrio faras kvin poentojn, sveno dek poentojn, nervoŝoko dekkvin poentojn, harblankiĝo tridek poentojn, freneziĝo cent poentojn. Kiel mi povus kunlabori dum tri monatoj kvincent poentojn? Sed tiom estas la postulata kvanto. Mia normo. Kaj krome, mi jam devis omaĝe proponi dekprocentan superplenumon por la honoro de la ĉijara fantomkongreso. Sed ne! Tute neeble. Kaj krom ĉiu ĉi malagrablaĵo baldaŭ sekvos la maldungigoj kaj mi eble devos plandi de oficejo al oficejo, ĝis fine iu anĝelo dungos min kiel aŭreolpolariston. Kun mia fakklereco! Do, tiu ĉi laboro fakte ne estas eldorado.

— Ĉu vi ne estas tro pesimista? Ĉu vere ne troviĝus alia ofico por vi?

— Vi estas tro optimisto. Bedaŭrinde, la teraj klientoj ĉiam donas al mi tiaspecajn naivajn konsilojn. Se mi plendas al la kliento, li aŭskultas dum kelkaj minutoj, poste oscedas kaj deklaras: "iru al la infero!" Sed ĉu mi havas hejstistan diplomon? Se mi estus almenaŭ finlerninta la astralkonservatorion, mi nun povus iri al la Sferoj, kie nun oni serĉas muzikistojn.

— Mi tre kompatas vin. Mi volonte helpus.

— Vi? Ĉu vi eble havas kontakton kun la Ministerio de Fantomvizitaj Aferoj?

— Ne. Mi havas kontakton nur kun la terloĝantoj.

— Mi tre kompatas vin. Sed tiam kiel vi volis helpi?

— Mi pensis nur pri via normo. Nome, viajn klientojn mi konas pli bone ol vi.

— Nu, vi jam diras ion realan — ekinteresiĝis la fantomo. — Rakontu nur!

— Kio estas via distrikto?

— Eŭropo.

— Bone. Nu, sur la tero ekzistas religioj, partioj kaj aliaj movadoj. Ĉiuj fiksas al si la ideojn de iu malnova profeto. Filozofo, aŭ ekonomisto.

— Jes. Ankaŭ mi scias tion.

— Do, vi vizitas la gvidantojn de la nunaj eklezioj, aŭ aliaj movadoj, vi iras al la politikistoj, ŝtatestroj, kiuj nun predikas la principojn de la iamaj fondintoj.

— La afero fariĝas ĉiam pli interesa. Daŭrigu nur!

— Nu, kaj vi prezentos vin, kiel la spirito de la fondinto.

— Kaj se ili demandas, kion mi volas?

— Tiam vi respondos: "Mi revenis, ĉar mi estis ĝis nun forigita kaj kaŝita kaj, se vi permesas, mi restos ĉi tie, por ke mi iome prosperiĝu en la movado".

— Brave! — ekkriis la fantomo — vi savis min, amiko. Mi forĝesis diri: apopleksio ducent poentoj!

— Krome: vi bone scias, ke ni havas statuojn pri niaj granduloj. Do, vi vizitos la skulptistojn, kiel la spirito de la karmemora grandulo kaj deklaras, ke vi intencas iom konversacii pri la arta valoro de via statuo.

— Eĉ pli genia ideo!

— Aŭ vi vizitos la direktoron de la Ŝtata Elita Teatro. Vi prezentos vin kiel la spirito de Shakespear kaj komunikas, ke vi intencas fari kel-

kajn intimajn rimarkojn pri la Hamlet-prezentado.

— Grandioze! Kaj la novaj teatraĵoj?

— Vi vizitos ties verkistojn kaj vin prezentas. Vi diros nur: "Mi estas la spirito". Kaj ne pli.

— Mi ne komprenas.

— Poste vi demandas: "kial mi ne troviĝas en via dramo?"

— Ah, mi jam komencas kompreni. Kaj se li emos doni al mi rolon en lia verko?

Pythius superece ridetis.

— Tiom aŭdaca verkisto ne troviĝas. Nur li ŝokiĝas.

— Do, dekkvin poentoj. Mi tre dankas. Vi savis min, kolego kaj mi ne estos maldankema.

— Kiel? Ĉu vi havas kontakton kun la teraj ministerioj?

— Ne. Sed vi asertis, ke vi estas animvidisto. Eble mi povos helpi vin. Do, malkaŝu al mi: kiel vi vidas la animojn?

— Ĉu mi malkaŝu? Kaj ĝuste al la konkurenco?

— Ho, mi en tute aliaj regionoj . . . nenia konkurenco . . .

— Nu bone. Mi malkaŝos. Do, la kliento en la antaŭĉambro devas dikti sian nomon kaj profesion al la sekretario. Ni supozu por ekzemplo, venas al mi juna virino. Mi tuj legas el sia animo, ke ŝi pensas sopire pri iu viro, kiu ŝin traktas malvarme.

— Interese. La komencon mi komprenas, ĉar kial ŝi venus al vi, se ŝi ne revadus pri viro kun sopiro. Sed la malvarmon kiel vi divenas?

— Nenia magiaĵo. Kial ŝi revadus sopire viron, kiu ŝin traktas varme?

— Bravisime! Sed ŝi petas evidente konsilon por varmigi la viron.

— Tiam mi respondas: "vi gajnos amon de la viro, se vi tute rezignos". Tiam la virino foriras kaj dum kelkaj semajnoj ne postkuras la viron.

Se la viro ekĵaluziĝas kaj proksimiĝas al la virino, mi jam pravas. Sed eble la viro tamen ne revenas. Tiam ŝi venas al mi kaj plendas. Responde mi eksplikas, ke ŝi ankoraŭ ne tute rezignis lin en sia animo. Kaj fakte, se ŝi plendas, tio estas evidenta, ĉu ne? Aŭ se ŝi rezignis, tiam ŝi jam ne venas plendi.

— Kaj se la viro revenus antaŭ ol la virino rezignis lin?

— Tiaspeca viro ne troviĝas.

— Tre interese. Kaj, se venas al vi komercisto, simila al mi?

— Ĉu vi pensas privatan negociston?

— Tiaspecan.

— Nu, ties pensojn ne estas malfacile diveni.

— Vi tute pravas — diris la fantomo enpenŝiĝinte, sed Pythius daŭrigis.

— Kaj se venas al mi altranga politikisto . . .

— Ĉu vere? — demandis la fantomo surprizite. — Kial ilin interesas la venonto, kiun ili mem preparas. Ili nepre scias, kion ili faras!

— Tiam ili ne venus al mi. Kaj tio estas mia feliĉo. Iliaj vizitoj garantias al mi la simpation kaj toleremon de la magistratoj.

— Kaj kion vi diras al la politikisto?

— Mi divenas, ke li havas multajn akrajn malamikojn, precipe en sia propra partio.

— Kaj se li postulas nomojn?

— Tiam mi malkaŝas, ke lia plej obstina malamiko estas iu malalta, bruna, okulvitra, kiu iome lamas per lia maldekstra piedo.

— Kio do! Kiel priskribon mi donas, — ridetis Pythius. — Inter la malamikoj de altranga politikisto nepre troviĝas ankaŭ tiaspeca. Ĝis nun ĉiu mia politikisto ekkriis: "Fak-

te! Mi jam delonge suspektis tiun friponon!"

— Kaj kion vi diras pri iliaj futuroj?

— Nenion.

— Kompreneble. Ĉar vi ne scias.

— Kontraŭe! Ĉar mi bone scias.

Kial mi kolerigu ilin?

— Ho, jes. Do, al oficialaj instancoj vi tute ne kutimas aŭguri la futuron?

— Kontraŭe! Ĉu vi ne kutimas legi la ĉiutagajn meteorologiajn bultenojn? "kelkloke bela vetero, aliloke malbela". Aŭ: "kelkloke la temperaturo ŝanĝiĝos". Nu, tiujn komunikadojn mi mem liveras al la instituto.

— Sed finfine tio estas esence ĉarlatanaĵo. Ĉu vi ankoraŭ ne estis akuzita?

— Ĝis nun ĉiu mia kliento estis tute kontenta. Mi divenis nur verŝajnajn kaj neĉagrenajn aferojn.

— Mirinde, kiom grandajn sukcesojn vi povas akiri per tiom primitivaj metodoj.

— Nu, vi vidas la animojn pli perfekte, ĉu ne?

— Memkompreneble, ĉar ankaŭ mi mem estas animo. Ekzemple mi povas tute precize priskribi vian opinion pri la mondsituacio.

— Pst! . . . Silentu! Cetere, se vi scias nur tiom multe, kial la memmortigo?

— Vi havas 45 jarojn; edzo. La edzino ferias, dum vi pasigas la tempon kun blondulino. Pardonon, ĉu mi estas tro maldiskreta?

— Nur iom tro laŭta. Sed via kapablo estas vere mirinda!

— Nu, permesu, ke mi rekompence donu al vi iom da astralfluidumo.

Ĝi vin kapabligas reale vidi la animojn, ellegi ĉiun personon kaj ekvidi ĉion, kio ie ajn okazas. Por vi ne estos kaŝita penso kaj kaŝita okazaĵo.

— Ĉu vere? Sed tiam vi faras min

neimageble riĉa kaj potenca! Mi tre dankos! Ĉu mi alportu glason por la fluidumo?

— Ne necesas. Intertempe mi jam transversis ĝin en vian animon. Sed uzu ĝin prudente!

La horloĝo batis unu.

— Ho, jam la unua! — ekkriis la fantomo. — Ĝis kokokrio mi havas du vizitojn!

— Kien vi rapidas?

— Mi vizitos literaturhistoriiston, kiel la spirito de Sándor Petőfi.

— Do, vi jam utiligas miajn konsilojn. Bonan sukceson!

— Dankon! Mi tre bedaŭras, ke mi ne povis vin timigi.

— Ne gravas. Eble sekvontokaze.

— Bonan nokton!

La fantomo ventsiblis kaj malape-ris.

*

Matene la sekretario eniris la laboratorion de majstro Pythius. La muroj estis kovritaj per hieroglifoj, sorĉinsignoj kaj sorĉofrazoj de antikvaj magiistoj. En la ĉambro astrolabo, desur la plafono pendis remburita krokodilo kaj vespertoj. Sur la tablo: magikristalo, egiptaj statuetoj de bestokapaj dioj, skaraboj kaj vastaj kodedoj, binditaj en huddledon.

— Bonan matenon! — li salutis.

— Bonan matenon! — respondis Pythius. — Sed kial vi envenas je la naŭa, anstataŭ la oka?

— Bedaŭrinde, la malbenita vekhorloĝo jam denove ne funkciis.

— Nu, ne moku mia amiko! La vekhorloĝo precize sonoris je la sepa, sed vi pludormis kaj nur post la oka vekigis, kiam la poŝtisto jam pugnobatis la pordon por almanigi la registritan leteron.

La sekretario ekpaliĝe gapis.

— Sed... sed majstro... Kiel vi tion scias?

— Kia demando? Ĉu mi ne estas

animvidisto? Kial vi gapas, amiko? Ĉu ne vi mem reklamas ĉie, ke antaŭ mi la animo estas malfermita libro, kotopo.

— Nu jes, sed tion nur eksteren... al la publiko... nur tiel...

— Kiel? — kriis la majstro. — Ĉu vi opiniis min ĉarlatano?

— Ho tute ne, nur... nur...

— Nenia nur! Enkonduku la gesinjorojn, kiuj nun atendas en la antaŭĉambro.

— Pardonon, sed en la antaŭĉambro estas neniu.

— Ili venis dum nia nuna interparolado.

La sekretario kapturiniĝis.

— Sed kiel vi...

— Ne miregu, sed enkonduku ilin. Kaj venonte vi ne demandu pri profesio. La viro estas librotenisto, la edzino instruistino.

— Nek... nek... nekredeble...

— Ne nekneku amiko, sed iru kaj plenumu vian devon.

La sekretario ŝanceliĝe ekiris, sed eĉ la pordon li mistrafis. Post kelkaj momentoj envenis la klientoj.

Post la reciprokaj salutoj la viro komencis:

— Niaj konatuloj proponis al ni viziti la majstron...

— Pri kiu ĉiu laŭde parolas. — interdiris la virino.

— Oni asertas, ĉiu via vorto estas vera vero — daŭrigis la viro. — Kaj ni ne estos sendankaj, se vi diros kelkajn vortojn pri ni kaj nia sorto.

— Tre volonte — respondis la majstro. — Pri la honorario vi mem decidus.

— Se mi nur unu vorton eraras, vi nenion pagas.

— Mirege! — entuziasmiĝis la virino. — Tio estas karakteriza pri la majstro.

— Do, ni povas komenci. Rigardu al miaj okuloj sinjorino... Bone...

Do, vi estas orfa. Vi havas du fratojn. Unu estas kuracisto en Szeged, la alia: elektristo en Bulgario. Ĉi sinjoro estas via edzo.

— Ĉiu vorto pravas! — fanatikis la virino. — Mi eĉ ne povas esprimi, kiel efikas al mi viaj vortoj!

— Vi loĝas en du ĉambroj en la Jókai strato. Unua etaĝo. Via murhorloĝo haltis kaj vi intencas ĝin porti al horloĝisto. Ne devas. Vi devas nur ekpuŝi la pendolon.

— Dio! Vera dio — kriis ekstaze la virino.

— Cetere vi naskiĝis en Arad, vi havas 38 jarojn.

— Ĉu... ĉu certe...? Ĉu vi ne eraras majstro?

— Ne! — deklaris superece la majstro. La edzo ekridis.

— Sed Matilda! Antaŭ la majstro kaj mi tute ne bezonas...

— Nu bone — konsentis hezite la virino. — Sed eble pri alia temo...

— Laŭ via deziro — kapjesis la majstro. — Vi perdis dekstran ganton.

— Tutprave! Kaj vane mi cerbumas, ne scias, kie.

— Tiam vi venis al bona loko. Mi indikas al vi precize: ĵaude vespere vi perdis, sed vi trankviliĝu: la sinjoro zorge gardas ĝin.

Al tiuj vortoj la edzo ekatentis.

— Kiu sinjoro?

— Li loĝas en Pomo-strato. Numero 36. Maldekstre de la ŝtuparo. Tie la sinjorino ĝin perdis.

— Kio do? — konsterniĝis la viro, sed eĉ pli nervoziĝis la virino.

— Absurdaĵo, majstro! Tute absurdaĵo! Ia eraro ŝoviĝis en viajn pensojn.

— La afero komencas fariĝi interesa — diris malice la edzo. — Do, Pomostrato 36. Maldekstre.

— Sed tute neeble, Eugeno! — histeriis la edzino. — Mi ĵuras al vi,

tie estas mia tajlorino... Tute neeble!

— Nur trankviliĝu, Matilda — daŭrigis jam minace la edzo.

— Alta, bruna viro li estas. Hodiaŭ li vespermanĝos ĉe vi. Li alportos la ganton.

— Ah! — triumfis la viro. — Do, vespere venos koramiko! Nu jen, la ĉarma Karlo! Kaĉjo! La kavalira, eleganta Kaĉjo! Nia familia amikego!

— Sed Eŭgeno kara! Ĉiu lia vorto mensogas! Kaj mi ne emas plu...

— Trankviliĝu nur Matilda! Hejme ni ĉion aranĝos! — li diris multkonjektigante. — Majstro, bonvolu nur diri, ĉu Kaĉjo, aŭ ne Kaĉjo?

— Eĉ ne unu vorton! Mi malpermesas! — kriis Matilda. — Ĉiu lia vorto estas aĉa mensogo kaj mi ne restos eĉ unu minuton ĉi tie!

— Sed kara Matilda, tiu, kiu havas puran animon, ne forkuras. Tiu ĉi via konduto estas iom stranga kaj nur fortigas la suspekton, ke vi eble tamen povus...

— Ne! Mi ne plu emas! Mi ne toleras tiujn kalumniojn.

Pythius jam enuis kaj volis fini.

— Por mi estas tutegale — li interdiris. — Tiam eble mi pristudos vian edzon, ĉu ne?

La edzo tuj perdis sian superecon.

— Mi...? Ĉu min?

Kaj Matilda regajnis sian ekvilibron:

— Jes, jes, vin! Nun sekvos vi! Eksidu nur kaj rigardu al la okuloj de la majstro.

— Sed karulino, vi mem diris, ke ĉiu lia vorto estas mensogo.

— Kaj vi tamen scivolis lian opinion. Nu, aŭskultu nur! Se vi kredas al li, tiam vi aŭskultos. Kaj krome, ankaŭ mi estas scivola! — Ŝi aldonis minacoĉe. — Kiu havas puran animon, tiu...

Eŭgeno jam tute moliĝis.

— Mi ne asertis, ke li diras la ve-

ron, nur ke mi estas scivola. Sed via bona eksento certe pravis, ke li mensogas kaj tiuokaze vere ne havas sencon pluparoli kun li.

— Sed vi supozis, ke mi kun Karlo en 36. de Pomò strato . . .

— Absolute ne! Mi ja scias, ke tie loĝas via tajlorino.

— Nu, fine revenas via prudenta menso, karulo!

— Tiam . . . Do ni ne plu restu, ĉu ne?

— Sed estimataj gesinjoroj! — interdiris nun la majstro. — Mi ne povas alimaniere fari.

— Sed mi! — tondris la viro. — Mi atentigos la magistratojn pri viaj finegocoj!

— Kaj la honorario?

— Haha! Por la mensogoj? Vi ja ricevos indan rekompencon, nur atendu! Bontag!

Ili forkuris kaj tondre frapfermis la pordon.

Pythius dum kelkaj momentoj senmove rigardis en la aeron.

— Freneziĝo! Vera freneziĝo! — li murmuris kaj sonorigis al la sekretario.

— Via deziro, majstro?

— En la antaŭĉambro sidas fotisto.

La sekretario jam ne konsterniĝis:

— Mirinde. Mi ne demandis profesion.

— Ankaŭ mi ne demandis vian opinion. Ne miradu, sed ensendu lin, ĉar li ĝuste nun ŝtelas viajn cigaredojn.

— E . . . e . . . e . . . mi kuregas.

Li elkuris kaj post momento envenis la fotisto.

— Bonan tagon, majstro!

— Bonan tagon! Do, vi volas scii, kial tiu ruĝharulo peticiis vian loĝejon ĉe la loĝejoficejo?

— La neatendita komenco ŝokis la fotiston.

— Sed majstro! — balbutis. —

Tio jam estas pli ol magia. Pri tio mi ankoraŭ . . . al neniu . . .

— Kial vi miras? Tio estas mia profesio . . . Do, aŭskultu: tiu ruĝharulo dum la sieĝo de la urbo elrabis juvelistan vendejon kaj la predon li fosis en la kelon de forlasita domo . . . Sed intertempe vi enloĝiĝis kaj okupis ĝuste tiun loĝejon, kiu havas la koncernan kelon, kaj li nun ne povas akiri la juvelojn. Ĉu vi jam komprenas?

— Ho! Nun eklumiĝas al mi! Kaj eksciuj majstro, tiu ruĝhara rabistestro, tiu publikmalamiko numero unu, tiu provis min komence subaĉeti. Li proponis al mi grandan sumon, se mi elloĝiĝos. Poste, kiam mi ne akceptis, li komencis ĉantaĝi. Li distrumpetis, ke mi aĉetis la loĝejon el mono, akirita per banditismo: mi senvestigis la stratirantojn en la flankstratoj. Nu, ĉu mi povus toleri tiun kalumniadon?

— Jes, mi scias. Sed ni devas koncedi, ke io prava tamen troviĝas en la vortoj.

— Kiel? — demandis konsternite la fotisto. — Kiel mi komprenu?

Pythius nur nun ekkonis la situacion. Tuj li retiriĝis:

— Mi volis diri nur, ke tiu kalumnio estas vere netolerebla.

— Ho jes! Tute netolerebla. Sed nun fine ĉi tiu bandito venis en mian manon, venkos la justo kaj la pura moralo! Sed diru majstro — alturniĝis subite. — Kian valoron havas la juveloj?

— Ĉirkaŭ ducentmil forintojn.

La fotisto saltleviĝis.

— Ducentmil? Ĉu mi bone aŭdis?

— Jes. Tiom.

— Majstro! Kiel mi rekompencu? — li elpoŝigis sian monujon. — Kiom mi havas? Tri, kvar, kvin . . . ĉu sescent forintoj sufiĉos?

— Ho, mi tute ne meritigas tiom . . .

— Ne unu vorton, majstro! — li

interrompis. — Pardonu, ke mi povas nun nur tiom . . . — kaj li demetis sescent forintojn. — Mi kuregos. Se mi revenos, vi ricevos multe pli . . .

La majstro sonorigis al la sekretario:

— Via deziro, majstro?

— La fotisto forkuris kaj mi jam ne povis sciigi lin, ke la juveloj jam ne troviĝas en la kelo. Se mi ne sciigas lin, li konsideros min ĉarlatano. Mi donos al vi lian adreson, bonvolu revoki lin por ke mi sciigu, kiu elfosis kaj vendis la juvelojn.

— Ĉu li donis sian adreson al la majstro?

— Kiom multe mi devas ankoraŭ akcenti, ke mi estas animvidisto. Antaŭ mi ne estas sekreto.

— Jes, jes. Nur al kutimiĝi estas iom malfacile. Sed ĉu ni devas tiel rapidi kun la reveko? Se li ne trovos la juvelojn, nepre li revenos.

— Sed li ne revenos. Unue li atakdemandos la ruĝharulon, kiam li forŝtelis la juvelojn el la tero. Li citos miajn vortojn kaj nomos la ruĝharulon rabisto. La alia deklaras, ke la tutan historion elpensis nur mi por eltiri 600 forintojn el lia monujo. Tiun respondon la fotisto kredos kaj ili ambaŭ atakos min. Fariĝos granda skandalo kaj finfine, apud la du rabistoj mi estos la sola krimulo, ĉarlatano kaj kalumnianto.

— Mi timas, ĉio ĉi havos malbonan finon.

— Kio?

— Via ĉiovida kapablo. Antaŭe la klientoj ĉiuj laŭdis vin kaj neniu nomis vin ĉarlatano. Sed nun . . .

— Ne timu. Mi scias ĉion pri ili. Mi antaŭvidos iliajn agojn kontraŭ mi kaj mi ĉiam forigos la danĝeron. Tial vi revoku lin.

— Jes. Mi petas la adreson.

— Tuj. Mi nur intencas kelkajn

vortojn diri pri la talismano, kiun vi vendis antaŭ kelkaj minutoj.

— Al la librotenisto?

— Jes. Dum mi konversaciis kun la fotisto. Vi povas sperti, ke mi scias ankaŭ tion.

— Ni ĉiam kutimas vendi talismanojn.

— Tute regule! Sed kiam la librotenisto forkuris, li minacadis ankaŭ al vi, ke li ja aranĝos radikale miajn aferojn ĉe la magistratoj, ĉar mi faras publikdanĝeran funkcion, mi kalumnias honestajn virojn, kotopo.

— Sed tion mi rifuzis.

— Tre bone, vi pledis por mi. Vi akcentis, ke mi ne kalumnias kaj mia ĉiovido nur utilas al la klientoj, ĉar mi povas doni valorajn konsilojn.

— Do, mi kondukis tute lojale, ĉu ne?

— Sed poste li deklaris, ke despli danĝera homo mi estas kaj oni devas liberigi la socion de mia malutila funkcio. Post tiuj vortoj vi tuj vendis al li talismanon por defendi lin *kontraŭ mia magio*. Nu, ĉu vi opinias tion ĉi honesta konduto? Jen, vi ruĝiĝis.

— Nome, mi pensis, ke . . .

— Nome, vi pensis, ke de post nun la dekforintan talismanon vi vendos al miaj ektimintaj klientoj por dudek forintoj, eksplikante, ke miajn sekretojn konas nur vi kaj scias, ke la talismano ŝirmas ankaŭ kontraŭ mia magio. Nu, ĉu vi ne respondas . . . kara amiko, mi ne envias la dek fojntan gajnon al vi, sed mia sekretario ne rajtas vigligi la suspekton pri magio. Tiun konduton mi ne povas toleri. Ĉu vi ne respondas?

La sekretario nur staris senvorte, tremante kaj kapmalleve. Pythius daŭrigis:

— Kaj nun, en ĉi tiu momento vi time pensas, ke mi eble scias pri la 2000 forintoj. Jes, mi memkompreneble scias.

La sekretario ekterure levis la kankon. Liaj lipoj ekvibris. Pythius daŭrigis:

— Vi ricevis la monon de via amiko por aĉeti al li radioaparaton. Vi aĉetis por milkvincent kaj diris al li dumil.

El la sekretario nun eksplodis la vortoj:

— Estimata majstro...

— Superflue, — interrompis Pythius. — Vi nun intencas sciigi vian maldungigon. Sed tute superflue. Kaj malutile. Mi enspezos abunde per miaj kapabloj kaj ankaŭ vi bone salajros.

— Sed, se ĉiam okazos la sama...

— Nature, ĉiam kaj la sama. Depost kiam mi vidas ion, mi atentos, ke mia sekretario estu mia kunlaboranto sen iu ajn kaŝintenco kaj mia unua devo estas ĉion diri al li. Nu, kial vi ekscitiĝas?

— Unu minuton mi ne restas ĉi tie! — li ekkriis kaj foriris.

— Via nomo? — demandis la anĝelo.

— Pardonon — diris Pythius — sed...

— Vi nun estas en la ĉielregno de la sinmortigintoj, en la kancelario por nove venintoj. Temas pri formalajtoj. Via nomo, do?

— Majstro Pythius.

— Profesio?

— Animvidisto.

— Mortospeco?

— Morfino.

— Kaŭzo?

— Iu fantomo donacis al mi astralfluidumon kaj...

— La nomo de la fantomo?

— Nomon li ne diris.

— Sed tiun indikon ni nepre devas enskribi. Vi provizore eniros la spiritaron, sed vi devas tuj serĉi la spiriton, kiu al vi donis la fluidumon.

— Kiel mi trovos lin inter la multaj spiritoj?

— Tre facile. Ni havas nur du bilionojn da spiritoj...

— Du bilionoj?! Kiel mi intertion...

— Ne interrompu. Vi devas forte fiksi viajn pensojn al li kaj renkontiĝo efektiviĝos tre rapide. Notarianĝelo, bonvolu akompani la novicon!

La notarianĝelo venis, turniĝis al Pythius. — Kandidato, koncentru viajn pensojn al la serĉitulo!

Pythius fermis la okulojn kaj forte pensis pri la fantomo. Li tuj ekflugis per terura rapideco. Ĉirkaŭ li furiozis ventego. Pythius kapturiniĝis.

— Ho, kiom da uragano! Kiaspeca forto tiregas min, kara notarianĝelo?

— Ni flugas per la flugiloj de la penso. Sed vi pensu nur pri la serĉitulo.

— Jes, mi pensegas... Jen! Rigardu!... Tie, tie!... Hola! Kolego! Kolego-o-o!

La vento ĉesis blovi. La fantomo staris vidalvide al Pythius.

— Ho, ĉu vi kolego? — li demandis surprize. — Ĉu ankaŭ vi faris finon al via vivo? Kial?

— Ĝuste vi demandas tion? Vi, kiu donis al mi tiun damnitan astralfluidon?

— Sed kio okazis?

— Kio? Tio, ke mi vidis ĉion, kion mi ne devus vidi. Ke mi diris ĉiam la veron. Ĉio malkaŝiĝis, kio ne estis destinita por la publiko: amsekretoj, arseniko, trompoj, falsigoj, defraŭdoj, la pasintoj de publike konataj, famoj, honestaj viroj, malpuraĵoj malantaŭ la kulisoj, la veraj motivoj de politikaj bombastoj. Ĉu mi devas multe klarigi la rezulton? Mi fariĝis la celpunkto de koncentrita atako. Oni kriakuzis min kaluminiisto, venenisto, ribelanto, perfidulo, ĉiaspeca fripono

kaj fine mi fariĝis la krimulo pro ĉiu, malkaŝiĝinta krimo.

— Interese. Sed se vi vidis ĉion, kial vi ne vidis la persekutajn agojn de viaj malamikoj?

— Mi ja bone vidis.

— Kaj kial vi ne povis forfuĝi?

— Mi faris nenion alian, nur fuĝis kaj fuĝis. Komence mi eĉ rebatis. Se mi ekvidis, ke iu intencas min ruinigi, subfosi mian prestiĝon, ankaŭ mi malkaŝis liajn malpuraĵojn. Mi eĉ vidis la aktojn, la ordonojn por aresti min. Mi sciis, kiu kaj kiel min persekutas kaj mi fuĝis. La landlimojn mi facile trapaŝis, ĉar mi sciis, kie estas la gardistoj. Tiel mi migris de regno al regno, ĝis fine la tuta terĝlobo fariĝis unusola mia malamiko kaj mi jam povis fuĝi nur al unusola regno: al la ĉielregno. Ho, tiu damnita fluidumo! Kiom multe mi atendis, ke vi foje aperos kaj reprenos ĝin! Sed vane!

— Mi tre bedaŭras, sed mi devas rimarki, ke vi mem agis malprudente.

— Kiel tion kompreni?

— Ĉu vi pensas, ke vi estis la sola sur la Tero, kiu posedis la astralfliudumon?

— Kiel? Ĉu eble estis ankaŭ aliuoj, kiuj vidis ĉion laŭ ĝia nuda realo?

— Estis kaj estos.

— Kaj kiuj estas tiuj malfeliĉuloj?

— Nu, ne tute malfeliĉuloj. Ili estas plejparte ĝenerale estimataj publikestroj, ŝtatgvidantoj, bankieroj, fabrikposedantoj, industriaj magnatoj, diplomatoj.

— Sed tio estas absurdaĵo! Ĝuste tiuj?

— Ĝuste tiuj. Nur ili uzas la fluidumon racie.

— Racie? Kiel?

— Neniokaze tiel, kiel vi uzis.

— Mi petas vin ne trostreĉi miajn nervojn. Malkaŝu fine, kiel eblas uzi

Jozefo Nagy

AVOJ SUR BENKO

*Sur la randa benko de la urba parko
sidas kvar amikoj lacaj kaj maljunaj.
Okulvitroj estas sur ilia nazo,
inter du pipfumoj glitas unu frazo
el ilia buŝo pri memoroj kunaj.*

*Kiom da memoroj el amas' da jaroj!
Kaj nun, kio pasis, vivas en babilo:
fojnodoraj noktoj de la naskvilaĝo,
jen malĝoja kaj jen gaja travivaĵo . . .
La memoro estas zorgoforigilo.*

*Ili ridetadas kaj senlarne ploras.
Dume vesperiĝas, steloj ekarĝentas,
ĉesas turdotriloj, ĉesas turtokveroj.
nur la tramoj zumas, fulmas per
ĵajreroj*

*La kvar maljunuloj pli kaj pli
silentas.*

*Sen parol', sen movo ili sidas plue,
gapas en la nigran truon de l'senlimo.
Ĉu sesdek' da jaroj pasis aŭ sepdeko?*

*Ĉu el dormo ilin revivigos veko?
. . . Poste kvar bastonoj frapas sur
pavimo.*

racie tiun kapablon, kiu povas akiri nur malamikojn?

— Vi eraras, kolego. La astralfliudumo malkaŝas al la posedanto la aferojn laŭ ilia nuda realeco kaj kapabligas lin scii, pri kio li devas silenti, respektive, pri kio li devas paroli tiel, kvazaŭ estus ne tiel, sed inverse. Sed vi agis tute kontraŭe, vane mi atentigis vin, ke vi uzu ĝin prudente.



Demandas malsanulo

*Kio ronĝas mian bruston,
mian pulmon, mian koron?
Kio havas tiun guston
kvazaŭ oni maĉus ruston
kun amaro de pulvoro?*

*Kial ĉi dolor mistera?
Kial kuracistoj mutas?
Kie diagnoz' la vera,
kiu kun dureco fera
ĉiun dubon fordisputas?*

*Kio sin en brusto kaŝas,
tage, nokte tie boras,
plej turmentas, se mi paŝas,
ke esperoj miaj kraŝas
kaj kun pen' ke mi laboras?*

*Ĉu ne vokas mem fatalo
per fajfado en oreloj
kvazaŭ sonus last-signal,
ke finiĝas la batalo,
ke malplenas pulvbareloj,*

*ke rompita estas spado
antaŭ ol ĝis fin' mi skermis,
antaŭ ol mi saĝi lernis...
Vi tro frue, hasta fato,
nefinitan libron fermis.*

14. 4. 1962

Johan Hammond Rosbach
akademiano

La Akademio havas la sekvantajn 40 membrojn post la nunaj balotoj, kiam nia kunredaktoro, *Johan H. Rosbach* i. a. iĝis nova membro.

Albault, Baghy, Bokarev, Bugge-Paulsen, Butler, Collinson, Cseh, Dalmau, De Hoog, Domingues, Faulhaber, Haferkorn, Hodakowski, Isbrucker, Jung, Kalocsay, Kawasaki, Krestanov, La Colla, Lapenna, Lippmann, Nakamura, Neergaard, Ossaka, Pragano, Pump, Rakuŝa, Régulo Pérez, Rosbach, Rotkvic, Scherer, Serälä, Söderberg, Solzbacher, Stamatiadis, Stöp-Bowitz, Szilágyi, Vilborg, Waringhien kaj Wong Kenn.

LA GAZETARO

*Mi estas roko, kiu vian voĉon
Reeĥas tiel, ke vi surprizite
Murmuras, "Kiel sane mi
konceptas,
Kaj la falsajon brave mal-
akceptas —
Sagace, sprite!"*

*Spiegulo mi, sur kiu via bildo
Moviĝas obeeme, ĝis debutas
Tio, ke foje vin ĝi anticipas,
Al vi humorojn, movojn ĝi
preskribas,
Kaj vi servutas.*

El la angla: W. Auld

Hungara aktiveco


Krom la bonega kaj grandioze sukcesinta Fervojista Mondkongreso en Budapeŝto (5—11, majo, 1962), kiun partoprenis 1200 esperantistoj el la tuta mondo, okazis la 28 kaj 29-an de julio internacia kaj hungara jubileo en impona amplekso en Budapeŝto, kiun ĉeestis kaj plene ĝuis 750 ges-anoj, ankaŭ el eksterlando. Inter tiuj du aranĝoj okazis la unua Hungara Somera Esp. Universitato en la modernkultura, arbarplena, ĉarma urbo, Gyula. 130 partoprenantoj aŭskultis la prelegojn de J. Baghy (La historio kaj estonto de Esp.), Imre Kádár (La historio de Gyula), Ernő Farkas (Esp. en la lernejo), B. Szemenyei (Pri niaj eksterlandaj interrilatoj), T. Borbala Szerémi (Esp. en la laborista movado). Kiel la antaŭe menciitaj aranĝoj, ankaŭ ĉi laste menciita impresis forte ĉe la publiko kaj gazetaro. En Gyula, cetere la unuan fojon okazis abiturientaj ekzamenoj ankaŭ el Esp. en gimnazio "Erkel".

**48-a Universala Kongreso de
Esperanto**
Sofio, 3—10 Aŭgusto 1963

Sub la Alta Protektado de la Bulgara Ĉefministro Anton Jugov.

Konstanta Adreso

La konstanta adreso de la 48-a U.K. estas: ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



Birgitte Neergaard (Kopenhago). Foto: prof. Joseph Asmar.

LA GLOBO

(Scienca-fantazia rakonto)

Viktor Ivanoviĉ Kilianĉuk estas juna kemia instruisto en Sovetio kun granda literatura kaj teknika interesiĝo. Kunlaboris ĉe televidaj programoj.

En la raketo ni estis jena kvaro: anglo Ken, germano Herbert, svedo Sven kaj mi. Pli lertan piloton ol Ken oni ne trovas en la tuta universo. Jam de sia infaneco li amis la astronomion, kaj li konis interplanedajn vojojn kiel sian propran poŝon. Herbert plenumis la rolon de kuracisto kaj radiisto. Ni ne bezonis kuiriston, ĉar ĝenerale ni mangis konservaĵojn, kaj en nia raketa mikrooranĝerio jam maturiĝis legomoj, plantitaj sur la Tero. Mangiĵojn ni do facile preparis mem. Sven estis optikisto kaj mekanikisto de la ŝipo. Mi plenumis la funkcion kiel estro de la ekspedicio kaj kapitano de la ŝipo.

Oni komisiis al mi studi svarmon de meteoretoj, fluganta inter Marso kaj Jupitero. Oni diras ke tiu svarmo estas restaĵo de pereinta planedo Faetono. La grandega gravitforto de Jupitero kaj Suno iam disŝiris tiun planedon, grandan preskaŭ kiel la Tero. Ni legis multajn fantaziajn romanojn pri tiu mistika planedo. Nun mi devus mem okupiĝi per tiu problemo por plenumi unu el la plej danĝeraj taskoj de "Scienca Konsilantaro Monday".

Por malgrandigi la riskon necesis starti de la Tero en direkto al Marso, tranĉi ties orbiton, pligrandigi la rapidecon kaj moviĝi laŭdirekte kun la meteoreta "svarmo" kun interaj dis-

tancoj de centoj kaj miloj da kilometroj.

Ni preterflugis la jam de longe esploritan planedon Marso, salutante per radiogramo la tieajn ekspediciojn. Ni alproksimiĝis al la celo. Bruegadis niaj fortegaj peliloj plirapidigante nian movadon. Kvankam ne granda, la akcelero tamen premetis nin planken. — Post tiu ĉagrena senpezo, basis Herbert, estas agrable iom senti ke sube estas "subo" kaj super la kapo estas "supro".

En tiu momento ni uzis magnetan plandon, sed nia korpo tamen restis malpeza.

Nia Sven jam komencis ĝustigi sian teleskopon. Mi eksidis apud la piloto antaŭ la radarekrano. Ken okupis sin per korektado de la vojaĝdirekto, sed nia kuracisto senokupa rigardis tra la fenestretoj al banala universa bildo. Jen aperas luma astro, kaj malgraŭ tio, ke ĝi ne diferencas de la aliaj, radias de ĝi io hejmeca. Jes, estas nia Tero. Iome flanke, malgranda sed hela, brilas la Suno.

— Ni proksimiĝas al la ĉefa regiono de la meteora svarmo, asertis Ken. Nia optikisto nenion respondis, sed nur pli atente komencis rigardi tra la okularioj. Li atendis signalon de mi. La radaro povus ja pli malproksime ol teleskopo "ekvidi" la meteorŝtonojn. Sed ankoraŭ nenio.

Tiel pasis preskaŭ 12 horoj. Nia kuracisto komence iom dormetis kaj poste ekpreparis mangiĵon. La ŝipo jam delonge havis la necesan rapidecon, kaj nun ĝi flugis per post-inerto.

Estis sufiĉe malagrabla kontinue

rigardi al la trankvila ekrano de la radaro. Post iom da tempo ĉiuj ekdormis, krom unu deĵoranto. Kvankam ni deĵoris laŭvice, Sven estis nun entuziasma volontulo.

La meteoroj kiujn ni komence vidis sur la ekrano radara estis malgrandaj, sed post iom da tempo la kurbo sur la ekrano tiel tranĉe turniĝis supren ke ni ĉiuj streĉis la kolojn. Tiu estas sendube granda korpo! La piloto aktiviĝis denove la movilojn, kaj la kreskanta pezo premis nin al la foteloj. La meteoros estis nun rigardebla ne nur teleskope sed ankaŭ per nura okulo. Ĝi aspektis kiel malforta brulanta punkto. Sed ju pli ni proksimiĝis des pli mi komprenis ke tiu kosma aro havas neordinare grandan dimension.

— Aŭskultu knaboj, murmuris Sven, ĝi havas tre strangan formon. Sajnas ke ni proksimiĝas al ia giganta piedpilko.

Kaj vere, post kelkaj horoj mi ne dubis pri tio, ke tiu tre stranga objekto havas sferan formon. Ken kalkulis ĝian diametron je 22 km. La alproksimiĝo al tiu-ĉi stranga ĉiela korpo ne postulis grandan penon. Por vidi ĝin pli bone mi elektis ĝian sunlumitan flankon. Antaŭ ni estis glata, grandega bilarda globo. Ĝia surfaco brilis metale. Senvorte ni surpronis niajn skafandrojn kaj suriris ĝian surfacon. Post kelkaj paŝoj tien kaj reen mi kriis en la skafandra mikrofono: — Amikoj, ĉu tiu-ĉi ne estas korpo konstruita de raciaj estaĵoj? Memoru la artefaritajn satelitojn de Marso, Fobos kaj Dejmos. — Jes, tre verŝajne, diris penseme Ken. — Sed vi nur konsideru kian malfortan graviton havas tiu ĉi bilarda globo. Kompare al ĝia granda dimensio la maso devas esti malgrava. Mi asertas al vi ke ĝi estas farita el ŝaŭmplasto aŭ ĝi estas ene kaverna kiel kaŭĉuka pilko!

Ni ĉiuj silente rigardis unu la alian.

Mi klinis min kaj provis per mia geologia hakileto havigi pecon el la surfaco. Sed vane. La hakileto resaltis, kaj ĝia tranĉando malakriĝis. Fine Herbert proponis esplorekskurson kelkajn kilometrojn for de la ŝipo kaj se necese fari "ĉirkaŭmondan" marŝon ĉirkaŭ tiu stranga globo. Laŭ kalkulo de Ken ĝia ekvatoro ampleksas ĉ. 70 km-ojn.

Tiel ni ankaŭ decidis. Post manĝo mi kaj Sven piede foriris por esplori, Ken kaj Herbert restis en la ŝipo. Ni havas kontinuan radiokontakteton, sed pro la kurbeco de la Globo (kiel ni komencis nomi la korpon) la kontakto povus ĉesi. Kaj tial ni interkonsentis ke, se ni post kvar horoj ne revenus, la restantoj en la ŝipo serĉu nin.

Malgraŭ tio ke al kosmonaŭtoj ĉiam dum vojaĝo inter fremdaj planedoj utilas signaloj de hejma radiostacio, ni kunportis girokompasojn. Tiuj ofte helpis nin, precipe sur planedoj kaj satelitoj sen magnetismo, kie ne utilas ordinara kompasos.

Pro malforta gravito estis malfacile iri. La piedoj glitadis, kaj ĉiu malforga movo ŝetis nin metrojn supren.

— Mi pli kaj pli firme asertas ke ni estas sur artefarita korpo, diris Sven, montrante al la ĝishorizonte glata surfaco de la Globo, — sed, de kie ĝi devenas, kaj dekoj da similaj demandoj — sen respondo.

Pasis horo, kaj ni vidis nenion alian krom la tute glata surfaco. Nenia fendo aŭ eliro. Por forpeli la enuon Sven vokis la ŝipon kaj petis gajan muzikon. Kun plezuro Herbert plenumis lian deziron, kaj sonoj de vigla melodio rapide levis nian humoron. Sed kiel kinoamatoro Sven neniel sukcesis. — Malbena polurita glato, li murmuris, se aperos ŝtoneto nur, mi oferos pro ĝi tutan ŝarĝon de filmo!

(Daŭrigota)

LIBRO-KULTURO

LA ARGENTA SPRONO DE SPECIMENE

Henri Baupierre: *Specimene. Parodioj kaj pastiĉoj*. — Dekoracioj de Gérard Jacques kaj Manolo Millares. — Stafeto: Beletraj Kajeroj, 11. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1962. — 19x12 cm. — 138 (132+6 nenumeritaj) paĝoj. — Prezo; 1.50 us. dol.

Proklamante la Aŭtoron de la Jaro 1962 dum la Belarta Konkurso en 47-a UK en Kopenhago 8/8 1962 f-ino Marjorie Boulton eldiris jene, kaj ni notis ĝin kvazaŭ recenze!

Kial oni petis min ĉijare reprezenti KOKO-n kaj paroli pri la Aŭtoro de la Jaro mi tute ne scias. Oni petis min esti koko ĉiuokaze kaj mi faros laŭ miaj ebloj por kokeriki, kvankam kontraŭ la naturleĝoj.

KOKO ĉiujare premias la Aŭtoron de la Jaro per bela arĝenta stelo, la tiel nomita Sprono de la KOKO, kun la celo sproni iun verkiston al plua verkado. Ĝi estas kvazaŭ la Nobel-premio por literaturo de la Esp.-movado. Ni kompreneble ne estas nobeloj, ni estas simplaj demokratiaj homoj, kaj do la premio ne estas tiel valoro. La ideo ne estas rekonigi delonge rekonitan aŭtoron aŭ doni ian famon al jam fama persono. Oni plie celas kuragiĝi novajn aŭ pli novajn talentojn, ekzemple en kvar sinsekvaj jaroj KOKO honoris: min, Juan Régulo Pérez, Tibor Sekelj kaj John Francis.

Sed kiun do KOKO elektis kiel la Aŭtoron de la kuranta jaro? Ha — la embaraso estas granda, ĉar ni mem ne scias, kiu estas. KOKO elektis verkon pseŭdoniman. La aŭtoro eldonis sian unuan verkon en la nuna jaro kun la titolo SPECIMENE.

Ofte recenzistoj apenaŭ povas recenzi, se ili nenion scias pri la aŭtoro. Ili honoras aŭ eble malhonoras personon kaj ne la verkon: sin klinas antaŭ titolo, ne antaŭ homo. Konata verkisto kvazaŭ rajtas verki kelkajn malbonaĵojn, dum oni superece emas ignori la promeson de novulo, sed KOKO hodiaŭ spiras ĉiujn tiujn rutinojn. Ĝi kokerike akklamas verkiston ĝis nun nekonatan kaj pseŭdoniman, kaj la verko mem estas tre sprita, eĉ mi dirus ke la verko estas iom vivoriska, ĉar tiu ĉi libro SPECIMENE estas brila parodia antologio, kiu majstre imitas la stilojn kaj karakterizojn de 40 el niaj plej konataj aŭtoroj. Jen specimeno el SPECIMENE. La unua linio tekstas jene: "En la komenco de l' jarcento du ebloj sin proponadis al la plej

ambiciaj esperantistoj: ellerni la lingvon aŭ fariĝi membro de la Lingva Komitato".

La tuta verko simile vipadas kaj simile spritadas. Ĝi estas verko, kiu ĝis nun plene mankis en nia literaturo. La travestioj kaj pastiĉoj estas tiel envie perfektaj ĝis plej intimaj detaloj, ke eĉ la viktimoj de la parodioj devas admiri, rideksplodi. La fidela ironia elekto de la vortoj kompreneble celas najli al la pilorio la klisemon, sed tiu bedaŭrinde necesa ekzekuto okazas kun la akompano de dolĉa, preskaŭ amema riderado, same kiel la vivisekcio de la Internacia Ekzamena Komisiono. Nu, tiu serioza ŝerce-mulo, tiu eksterordinare erudicia arlekeno vere palpas la pulson de nia movado. Lia verko estas preskaŭ kompleta unua kurso pri Esperanta literaturo, kaj fakte mi forte suspektas, ke post kelkaj jaroj malfeliĉa kandidato en ekzameno citos ion el la parodioj de BAUPIERRE kredante ke ili estas originalaj tekstoj! Laŭ mia opinio tiu ĉi libro estas unu el la plej amuzaj verkoj, kiuj iam ajn aperis en Esperanto.

Plie mi kuragiĝas diri, ke se ĉiuj seriozaj esperantistoj aĉetus tiun libron kaj bone legus ĝin, multaj el niaj disputoj, multaj el niaj stultaĵoj malaperus en kobaltbombe vasta rideksplodo, kiu skuus la tutan verdan terglobo. Ĝi estas kiel iu saniga vento, kiu iom vipas kaj ŝokas, sed tamen purigas kaj refortigas kaj freŝigas.

Tamen estus tre helpe al KOKO, se ili sciус kiu estas HENRI BAUPIERRE. Ĉu vi, se vi ĉeestas, sinjoro HENRI BAUPIERRE, havas nun la kuragon malkaŝi vian teruran sekreton? Ĉu li ĉeestas? Se jes, sinjoro, venu ĉi tien al la podio, kaj mi donos al vi tiun ĉi tre belan arĝentan stelon, la Arĝentan Spronon de KOKO kaj mi donos al vi la diplomon, kaj mi ankaŭ donos al vi tian vangofrapon, ke dum tuta semajno via vizaĝaĉo estos nesimetria, poste tian kison, ke dum du noktoj vi havos brulantan febron, ĉar mi tre amas bonajn verkistojn, kaj via talento estas io kio ege ravas min, kvankam mi estis unu el vial viktimoj, vi kanajlo.

Do, ĉu HENRI BAUPIERRE deziras veni al la podio? — Nu mi devas konkludi, ke aŭ li fakte ne estas, aŭ ke li tiel alte taksas la propran felon, ke li ne riskas forĵeti la vualon de sia kaŝnomo.

Provizore do la Arĝenta Sprono restos en depono ĉijare eĉ la eldonejo KOKO.

Kahlil Bibran: La Profeto. — El la angla tradukita de Roan Orloff Stone. — Antaŭparolo de Elias F. Shamon. — Enkonduko de E. James Lieberman. — Stafeto: Beletraj Kajeroj, 13. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1962. — 19x12 cm. — 128 paĝoj. — Prezo: 1.00 usona dolaro.

L. L. Zamenhof: *Proverbaro Esperanta*. — Alfabeto ordigita kaj provizita de indksoj analiza kaj sinteza de C. Rogister (kun posthelpo de A. Caubel). — Enkonduko de G. Waringhien. — Antaŭparolo de M. F. kaj L. I. Zamenhof. — Stafeto: Beletraj Kajeroj, 10. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1961 (fakte 1962). — 19x12 cm. — 1962 (XXVIII + 168) paĝoj. — Prezo: 1.50 usonaj dolaroj.

La eksterordinare valora libro de Kahlil Gibran, la genia artisto kaj verkisto, kiu jam ĝis nun atingis milionon da ekzempleroj en 20 lingvaj variantoj, ne apartenas al la ampleksaj verkoj, sed sur siaj relative malmultaj paĝoj ĝi donas kompletan arton, belon kaj saĝon de "profeto" en la plej nobla senco de la vorto. "Mistikulo, laŭ Gibran, estas nur persono, kiu fortiris unu vualon pli (el la vero)" — ni legas en la Antaŭparolo. "Tial *La Profeto* allogas tiun, kiu ŝatas la senpudoran nudecon de bela, kortuŝa vero. La libana verkisto, kiu mortis en sia 48-a jaro, pruvis per sia tuta elstara vivverko, ke li apartenas al la puraj homaranoj, kaj legante la libron oni havas la senton, ke ĝi estas iaspeca vortilustro al la homaranismaj esoj de Zamenhof. — Oni povus longe paroli pri la beleco de tiu ĉi libro, sed multe pli sensige estas citu kelkajn partetojn el la libro por ke la leganto komprenu, ke li bezonas tiun ĉi libron. Jen preskaŭ laŭ la hazardo sur la p. 39:

"Tiam diris riĉulo: Parolu al ni pri Donado.

Kaj li (la Profeto) respondis:

Vi donas nur malmulton, kiam vi donas el viaj posedaĵoj.

Nur tiam vi vere donas, kiam vi donas el vi mem.

— — —

Estas bone donaci petite, sed estas pli bone donaci nepetite, pro komprenemo. — Estas vere la vivo, kiu donas al la vivo — dum vi, opiniante, ke vi estas donantoj, estas nur atestantoj.

Oni povus elŝiri multajn frazojn el la trezoro de libro, kiuj brilas ankaŭ en tia izoliĝo, sed multe pli anime plezure inter siaj parencaj frazoj, kiuj entute formas veran parolon de altspirita genio.

Ofte ni notis ĉi tie, ke ni estas dankaj al la Stafeto pro aperigo tiu aŭ tiu verko, sed la recenzanto, post la formeto de tiu ĉi libro volus diri emfaze ian tute specialan dankon pro tiu ĉi libro, kiu digne ornamas la libroliston de la Stafeto.

Bela, inspirita traduko.

F. S.

C. Rogister, kiu tiel sindone, tamen senbrue laboris kaj utilis al nia movado, dum longaj jaroj preparis tiun ĉi bonegan, analizan eldonon de la Zamenhofa Proverbaro kaj estas vere aflikte, ke ni povas danki la persistan kaj elegante saĝan laboron de Rogister jam nur post lia morto. Li forlasis nin en dec. 1961, kaj tiel li mem ne ĝisvivis la aperon de la nuna libro; prof. Waringhien devis tute pretigi la libron. Mem la verko estas konata kaj ĝian gravecon ĉiuj ni konscias. La analizaj grupigoj laŭ temoj donas bonegan helpon al la studento kaj enkonduko, (Waringhien), averto (Rogister), la zamenhofaj antaŭparoloj kune donas bone manipuleblan, tre altvaloran poŝlibron same uzeblan al novuloj por pedagogia celo, kiel por progresintoj aŭ perfektuloj por analizo aŭ literatura aplikado, eĉ por ampleksigo de tiu ĉi interesa, frua eksperimento, pri kio cetere la enkonduko donas kelkajn sugestojn.

Nepre akirinda libro.

F. S.

Svedlingva trezoro de internaciaj citaĵoj

Helge Pettersson: *Bevingade ord och uttryck på främmande språk*. Eld. Natur och Kultur, Stockholm. 3-a eld. 1958. Prezo 7: 50 resp. 12: — sv. kr. (bind.)

Waringhien en "Lingvo kaj vivo", (Esperantologiaj esoj) mencias pri sia malnova revo, ke iu erudita esperantisto iam eldonu kun tradukoj en esperanto kolekton da frapantaj frazoj el la tutmonda literaturo.

En sveda lingvo tia kolekto jam ekzistas. Jen la verko. Ĉar la verkinto Helge Pettersson, estas fervora defendanto de esperanto en la paca movado, kie mi renkontis lin oni povus esprimi la deziron, ke li en kunlaboro kun Waringhien kaj aliaj iniciatu efektivigon de la nomita revo. Ĝis tiam mi povas nur rekomendi studon de la libro de Pettersson. La verkinto bone kaj zorge efektivigis la waringhienan penson kaj senproĉe plenumis sian taskon.

F. L.

La 11-a kajero de Sennacieca Revuo

La valoran enhavon de la "Sennacieca Revuo 1962" uverturas la bela traduko de verkfragmento de *Gustave Le Bon* (Psikologiaj leĝoj de la evoluo de l' popoloj). La artikolo, aperinta en 1896, kvankam en multaj rilatoj vekas la diskutemon, estas sendube interesa, profunde sagaca kaj pripensiga, eĉ se la pensoj ne sekvas ĉiam la direkton, donitan de la fama sociologo. — Vieno kaj la aŭstra moderna historio estas la tomo de la sekvaj artikoloj; *B. Hasecke* esas pri orientaj (japana, ĉina) sociaj fenomenoj. Amuze sprita kaj trafa estas la studo "Antaŭjuĝoj transdaŭrantaj" (*B. Evans*). Jen sekvas nova geografia kaj sociografia artikolo pri la Novaj Hebridoj. Pri la arta "romantiko" esas *G. Barlow*.

Lagrange daŭrigas sian analizon pri "Evoluismo kaj Kristanismo", direktiĝanta kontraŭ la judo-kristana metafiziko. *Raymond Schwartz* prezentas siajn freŝajn "ridpunktojn". Pri la ĵazo, kaj la socia enhavo de la ĵazmuziko oni povas legi — laŭ ni — iom tro aposteriore perceptitan studon. Poemoj de *Emba* kaj *Grenejo* kompletigas la interesan 56-paĝan kajeron. Prezo: 3: 25 sv. k.

Pejzaĝoj de Ĉinio

Jen tre bela albumo kun 48 impresaj (parte koloraj) fotoj pri la vasta, ekzotika, bela lando, al kiu la albumo vekas intereson, simpatian kaj komprenon. La eldonejo (Ĉina Esp. Ligo) meritas laŭdon pro la bela eldonaĵo. Prezo: 4.00 sv. kr.

Pitoreskaĵoj de Pekino. Albumo de 12 multekoloraj poŝtkartoj, kun vidaĵoj pri la ĉefurbo de Ĉinujo: parkoj, palacoj, temploj ktp. Prezo ne indikita. Eldonis: *Ĉina Esperanto-Ligo, poŝtkesto 313, Peking, Ĉinujo*.

La kongreso por la paco kaj malarmado en Moskvo (9—14 jul.)

akceptis deklaron de Mondpaca Esp. Movado, kies lastaj vortoj tekstas jene: "Ni petas la Mondan Konsilantaron kaj ĉiujn samcelajn naciajn organizojn uzi la fortojn de MEM kiel konstante kunlaboranta organizaĵo. Ni alvokas vaste uzi la internacian lingvon, Esp, elprovan dum 3/4 da jarcento kiel bonega ilo de porpaca, porprogresiga kaj kultura kunlaborado".

Eŭropa Lingvo-Kampanjo

Post longjaraj klopodoj en la eŭropfederalista movado antaŭ kelkaj semajnoj la Prezidantaro de la Eŭropa Unio Germanujo for-

Oficiala Raporto pri la 4a Geografia Semajno, Odense, 26/7—4/8 1962

Partoprenis la Semajnon 30 personoj el 7 landoj, kaj periodaj gastoj. — Jenaj dek prelegoj okazis:

H. Grønberg: Husmandsskolen kaj la etbienula movado.

V. J. Kostiainen: Geografiaj aspektoj de Finnlando.

Birthe Trærup: Popola arto kaj popola muziko de Jugoslavio.

Tibor Sekelj: Freŝaj impresoj pri la karavano de Amikeco (sonbendo).

G. Roelofs: La batalo kontraŭ la akvo en Nederlando.

H. Grønberg: Dano rigardas Ĉinion.

Poul Thorsen: Fungonarkotikoj.

M. Jullien: La ekonomiaj teorioj de Jacques Duboin.

Roma Thorsen: Esperanto kiel praktikilo en la geografia instruado.

Catherina M. Burger: La kibucoj de Israelo.

Krom multegaj kolorlumbildoj oni montris 15 sonfilmojn, el kiuj 6 estis esp-lingvaj kaj plej multaj koloraj.

Okazis dana, nederlanda kaj franca vesperoj, interesaj ekskursoj.

Ĉiuj kursanoj havis plenan pensionon en la bela etbienula lernejo, kies geestroj, Elisabeth kaj Harald Grønberg, preskaŭ dorlote zorgis pri ĉiuj bezonoj kaj eĉ la lastan vesperon feste akceptis ĉiujn en sia hejmo.

P. T.

mis komisionon el inter siaj membroj por la studado de la eŭropa lingvo-problemo kun speciala konsidero de la avantaĝoj, kiujn eble nia Internacia Lingvo povus doni kiel komuna eŭropa lingvo.

Tiu tre laŭdinda decido povos eble havi tre gravajn konsekvencojn. Tial estas oportune, ke niaj amikoj en la Esperanto-Movado kuraĝigas la laborojn de la komisiono per afablaj leteroj; ĉar en la Prezidantaro estas forta kaj influa grupo, kiu kontraŭas niajn intencojn.

Oni skribu al jena adreso:

Europa Union Deutschland — Generalsekretariat

Bonn/Rhein, Stockenstrasse 1—5,

Fed. Resp. Germanujo.

Sed en viaj leteroj vi niel rajtas mencii tiun ĉi informon.

La ĉefurbestro de Vieno parolis en Esperanto

Samtempe kun la 47-a U.K. en Kopenhago okazis en la aŭstra ĉefurbo la 35-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

La manifestacion partoprenis 550 personoj el 18 landoj. 32 infanoj estis prizorgataj de s-aninoj Dr Petrtschek kaj B. Lachmaur.

Ĉe la oficiala malfermo parolis urbestro de Vieno, F. Jonas, mem malnova esperantisto. Li diris i.a. "Depost pli ol 40 jaroj mi povas observi la evoluon kaj sorton de la Esperanto-laborista movado. Kiel juna homo mi sentis la grandecon de la ideo, pritrakti la internaciismon per komuna lingvo. Mi fariĝis sennaciulo kaj plivastigis mian spiritan horizonton interilate kun kamaradoj en multaj landoj.

...Necesa estas internacia solidareco kaj interkompreniĝo. Necesa estas paco por ĉiuj! Antaŭ ni staras la historia demando, ĉu la homaro komune vivos aŭ komune pereos!

Ni konfesu sincere, ke ni esperantistoj, ne estas potenculoj. Ni posedas nur la firman volon kunhelpi, ke nia mondo fariĝu paca kaj libera por ĉiuj. Ni posedas nian internacian lingvon, per kiu ni pli rapide kaj pli efike ol la aliaj, majstras la malkomprenon kaj ŝovinismon inter la popoloj".

Ankaŭ la akcepto de la urbo kaj urbestro en la grandioza viena urbdomo restos ĉiam bela memoro.

Entute bela kongreso.

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 1962

Originala Poezio: Premiitaj

Sylla M. Chaves, Brazilo, Miyamoto Masao, Japanujo, Alvaro de Orrids, Francujo.

Tradukita Poezio: premiigis

Marjorie Boulton, Anglujo, Henry Fridén, Norvegujo, Trygve Raimar, Norvegujo.

Originala Prozo: premioj

Albert Samyn, Belgujo, Marjorie Boulton, Anglujo, Clelia Conterno, Italujo.

Originala Dramo: premiitaj

Marjorie Boulton, Anglujo, Vesna Skaljer-Race, Jugoslavio.

Premio "Nova Talento"

Mario Sola, Italujo.

IVa ĉebalta esp. tendaro

24/7—10/8, 1962 en Drabeši, apud latva pitoreska urbo Ĉesis okazis la tendaro, kolektanta 300 esp-istojn. Bonega organizo, valoraj programoj laŭdis la lertajn latvajn aranĝantojn.

El Kopenhago:

Jen kelkaj novaĵoj el la 47a UK

La nova estraro de U.E.A.:

La prezidanto: Prof. D-ro Hideo Yagi, Okajama, Japanujo. Vicprezidantoj: S-ro H. W. Holmes, O.B.E., Londono, S-ro E. L. M. Wensing, direktoro de Departemento de Elektro-Medicinaj Aparatoj de Philips, Eindhoven. Ĝenerala Sekretario: Prof. D-ro Ivo Lapenna, Londono. Estraranoj: S-ro E. J. Woessink, Arnhem, Nederlando, D-ro A. Almbault, okulkuracisto, Toulouse, Francujo, S-ro Sven Ziegler, Kopenhago, Danlando, S-ro Z. Csuba, Varsovio, Pollando.

Prof. Ivo Lapenna diris interalie (solena parolado)

Mi estas ankaŭ certa, ke la Internacia Lingvo estas matura por kontentigi la bezonojn. Necesas nur, ke ni ĉiuj agu unuece: unuece ne nur el lingva vidpunkto, ne nur el organiza vidpunkto, sed ankaŭ el vidpunkto de la celoj. Necesas, ke ni ne perdu nian tempon por malgravaĵoj kaj akcesoraĵoj, sed ke ni centrigu nian tutan atenton al la esenca afero. *Kaj la esenca afero estas, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas komunan lingvon, ke sekve devas esti trovita kaj tre versajne estos trovita solvo jam en tiu ĉi generacio kaj ke ni estas kapablaj doni al la homaro la belan, klaran, logikan, evoluintan Zamenhofan Internacian lingvon.*

Sen vokalo (Enigmokonkurso)

La gajninto de la lasta konkurso estas kun siaj 1908 vortoj: s-ano Walter v. Waldowski, Birkenwerder, Fontaneweg 40. Germ. D. R.

La nova tasko povas danki sian inspiron al la celkonscia gvidanto de la esperantosekcio en la radio Vieno, s-ano Vokal, sub kies komando okazis naŭpersona radiointerŝuo. Dum la ekzercado ni havis ofte afablan, sed tre klaran averton. "Bonvolu mallongigi, tro longe"! La jena tasko montras certe la plej mallongan solvon, tute senvokalan. Bonvolu restarigi la originalan tekston kaj sendu ĝin — ne al la viena radio, sed al Norda Prismo: Barnhusg. 8, Stockholm, kie libropremio estas startopreta. Jen la tasko senvokala:

Sr l kmp fr dl mnd — nt nkt d smr — mkn n l rnd — knts kntn pr l spr — Kj pr vv dtrt — ŝ rknts kmptnt — m vnd rfrpt — mn dlrs rsngrt.

Limtempo: 20/12 1962.

UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

Bilaga medföljer

CERTIGU LA APERON DE
NORDA PRISMO
PER FRUA ABONO POR 1963!



MALNOVAJ JARFOLIOJ DE NORDA PRISMO

Taŭga donaco al orienta amiko 1958-1961 por 7.— sv. k. po unu jarfolio. (1.50 Us. Dol., 18 int. resp. kup.)

TENERIFE

Ĉu vi ŝatus posedi domon en la rava insulo en Atlantiko? Ni konstruas laŭ via gusto. Internacia Atmosfero! Ĉiama Printempo! Nenia Hejtproblemo! Nenia Atomtimo!

Belegaj terenpecoj kun panorama rigardo en Puerto, disponeblaj.

Planas germanaj inĝenieroj. Petu detalojn de *D-ro Tadros Megalli Münsing* am Starnberger See, Germanujo.

Deziras E-librojn, interŝanĝas germanajn, sovetajn, italajn, anglajn kaj francajn por tiaj. Klaus Urban, Dresden A20, Tiergartenstr. 20 VI, GDR. (24-jara).

Juna bulgaro intencas aranĝi dum 1963 ekspozicion de ĉiuj pm kun Esp. temaro, kaj tiucele deziras interŝanĝe akiri tiajn. Same li kolektas pk kaj pm skandinaviajn. Adreso: Kiril Hlebarov, 6 Deljev 8, PET-RIČ, Bulgario.

Konvena donaco!

Willy Breinholst

NI EN SKANDINAVIO

kun la karikaturaj de Leon van Roy

Esperantigis: F. Szilágyi kaj Regina Emson
Informiĝu ridante pri la skandinaviaj!
Prezo nur: Kr. 2: 25 aŭ Us. Dolaro 0: 50.
Mendebla: Esperanto Skolan, Barnhusgat. 8, Stockholm.

ESPERANTO FÖR ALLA

20 lecionoj. Riĉe ilustrita.

Gramatika resumo en la sveda lingvo.
Bonega donaco! Prezo: 4: 50 kr.

Mendebla ĉe Esp. Skolan, Barnhusg. 8, Stockholm.

Mendu librojn, leterpaperon, ĉe ESPERANTO SKOLAN

Barnhusg. 8, Stockholm.

Rapida, akurata servo!

Du lernantinoj, Nadka Ivanova (17 j.) k. Nedka Georgieva (16 j.) korespondus bk. k. ĉ. l. ĉiuteme. Adreso: str. 27 dekemvri no 10. KARLOVO, Bulg.

Bonvolu kontribui al desvastigo de Esp. — sendante la multkolorajn p. k., filatele frankitajn leterojn, prospektojn, k. t. p. al esper-ekspoz., okazonta en oktobro 1962 en la Uzina Kulturdomo en Oswiecim. Certa respondo. Koran antaŭdankon: Fryderyk Slatynski, Oswiecim 4, str. Somluchowskiego 6/3, Pollando.

FRUA ABONO — DUOBLA BONO! DANKON!

Por siaj 11-jaraj lernantoj, (pioniroj) serĉas korespondantojn Rózsa Cserhalmi, (ekonomiistino), Illés-u. 23, Budapest VIII. — Hungari.